

6/2018

Novembro
Decembro

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Piano kiel armilo
- ★ Heindrich Zimmermann-strato
- ★ Nova membrokamapanio de UEA

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Kunlaboro

T. Nemere, M. Tatara,
A. Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2018 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post aldono
de 5 eŭroj por la bankaj kostoj.
Polan Esperantiston eblas aboni per
Konto de PEA en UEA: peaa-v;
Detaloj troviĝas ĉe:
http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO
ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Aleksander Zdechlik - prezidanto
Teruo Matsumoto - vicprezidanto
Robert Kamiński - sekretario
Alina Mozer - kasisto
Agnieszka Mozer - estrarano
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Reprezo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Eventoj	
<i>Teresa Nemere</i> , Pri Esperanto en Klubo de Katolika Intelektularo en Toruń	3
<i>Robert Kamiński</i> , Nova Eŭropa volontulo en Bjalistoko	4
<i>Fondumo Zamenhof</i> , „Tra la Mondo”	5
Mojose	
<i>Mariusz Hebdzyński</i> , Daŭru Silvestro la tutan jaron!	6
<i>Małgorzata Sopińska</i> , <i>Rafał Mościński</i> , PEJ -semajnfino en Łódź	7
Raportoj, rakontoj	
<i>Roman Dobrzyński</i> , Piano kiel armilo	8
<i>Adam Wilkus</i> , Poliglotoj venis al Slovenio	12
<i>Roman Dobrzyński</i> , Litvo patrujo mia... 2-a parto	15
Pri kio ni aŭdas	
<i>Jean Marc Leclercq</i> , Mi neniam kredis je „Kristnaska Paĉjo”	19
<i>Mark Fettes</i> , Nova membrokampanio de UEA	20
<i>Bjalistoka Esperanto-Societo</i> , Rezulto de la Literatura Konkurso 2018	22
Vizitindaj lokoj	
<i>Adam Wilkus</i> , Marŝe kaj legende en la Montaro Karkonosze	23
Homoj	
D-ro <i>Aneta Stawiszyńska</i> , Heindrich Zimmermann-Strato	26
<i>Paweł Fischer-Kotowski</i> , Hori Jasuo: La Esperantisto de la Jaro 2018	28
Lingvosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , „La” – specialaj uzoj – 1-a parto	29
Literaturaĵoj	
<i>Teresa Nemere</i> , Polaj kristnaskaj kantoj	31
Saĝulaj pensoj	
<i>Andreo Bach</i> , Blanka panpeco	33
Leterkesto	
<i>La teamo de IIK 2019</i> , Infana kongreseto dum UK	35
Eŭropa Bulteno 12/2018, Vytenis Anriukaitis subtenas la 55-an BET	36
<i>Anna Löwenstein</i> , Nova retejo por novaj esperantistoj	36
Kalendaro	37
Oni eldonis	
ZEO-informilo, Feliks Hiller, „Ho tiuj fremduloj”, “Bjalistokaj kajeroj nr- 7”. “Zbigniew Herbert – poeto de konscienco:”	40
<i>Robert Kamiński</i> , Konata vortaro ankoraŭ aĉetebla	42
Forpasis	
Zbigniew Czupkałło	42
El fotogalerio de Andrzej Sochacki	
<i>Andrzej Sochacki</i> , Kvinaj Esperantaj Tagoj de Kraków – 1985	42

Redaktoraj vortoj

Estimataj Legantoj!

Ni troviĝas ĉe la fino de la 2018 jaro. La esperantistaro, kiel ĉiuj homoj, observas, kiel rapide pasas la tempo kaj eventoj en Esperantujo. Antaŭ nelonge estis kongresoj en Madrido, Lisbono, Zabrze, esperantistaj feriadoj en Mielno kaj en Ladek Zdrój. Ni, kun iom da sentimento, povas rememori la agrablajn momentojn kaj ankaŭ pensi, ĉu ni mem ion aldonis al la okazintaj programoj, ĉu ni iomete plibonigis ilin. Se ni konstatas - "jes", ni povas esti kontentaj. Tio signifas, ke ni aldonis nian propran briketon al nia esperantista domo. Sed ofte ni nur ripozas dum esperantistaj kunvenoj. Tio ankaŭ tre gravas, tamen pripensu, ĉu eble venontjare valoros aldoni al nia familio ion propran. Pensu pri tio.

Nun atendas nin denove nova jaro, novaj decidoj kaj elektoj. Kalendaro de la novaj Esperantaj eventoj jam pretiĝas. Novajn renkontiĝojn tentas. Kion elkti? Ĉu vojaĝi al UK, ĉu al la konkureca BET? Nepre legu pri tio sur la paĝo 37. Jam duan fojon, la kalendaro enhavas informojn pri la plej gravaj Esperantaj eventoj en niaj najbaraj landoj. Mi deziras al vi optimismon dum la jaro kaj bonajn decidojn.

En la ĉapitro "Homoj" vi povas legi interesan artikolon de Aneta Stawiszyńska, pri la preskaŭ tute forgesita ĵurnalisto, felietonisto kaj esperantisto Heindrich Zimmermann el Łódź.

Roman Dobrzyński, okaze de la centa datreveno de sendependiĝo de Pollando, skribas pri Ignacy Paderewski, kiu multe kontribuis al la renaskiĝo de Pollando.

Kompreneble, en la nuna kajero, aperas temoj rilatantaj Kristnaskan Feston. Du aŭtoroj kaj, neatendite, du kontraŭaj vidpunktoj prezentas Andreo Bach kaj Jean Marc Leclercq. Teresa Nemere interese skribas pri la kristnaskaj kantoj en la ĉapitro „Poeziaĵoj”.

Nia fotogalerio ŝanĝis sian formon. Nun plenigas ĝin dokumentaj fotoj de Andrzej Sochacki. Li estas konata fotisto kaj fotokronikisto de la pola E-movado. Nun prezentataj liajn fotografajoj, kiuj dokumentas konatajn E-eventojn kaj interesajn personojn, ĝis nun malofte, aŭ neniam aperadis en gazetoj kaj revuoj. Ni vojaĝu tra la tempo de pasinteco. Eble vi trovos vin sur la fotoj.

Vi ankaŭ povas iom turismi tra montaro kaj Slovenio kun Adam Wilkus.

Mi invitas vin al la legado kaj mi petas bonvolu almenaŭ iom kontribui al kreado de nia gazeto.

Robert Kamiński

Pri Esperanto en Klubo de Katolika Intelektularo en Toruń

Dum la Zamenhof Jaro (2017) kaj ankaŭ ĉijare, kiam ni esperantistoj, festas la 100. datrevenon de la unua eldono de la esperantigita epopeo de Adam Mickiewicz *Sinjoro Tadeo*, esperantistoj en Toruń strebis rememori, popularigi Esperanton en diversaj kulturinstitucioj. Tiuspeca propono, iom surprize por ni, vekis intereson ankaŭ en la toruna Klubo de Katolika Intelektularo, kies membro ankaŭ mi estas jam de multaj jaroj. Multfoje mi rimarkis interesiĝon de la klubanoj, dum miaj hazardaj rakontoj pri miaj



travivaĵoj pere de Esperanto kaj pri esperantistaj aranĝoj en diveraj landoj.

Polaj E-poetoj – meze sidas Antoni Grabowski

La klubanoj interesiĝas, prelegas kaj diskutas pri diversaj

temoj. Lastatempe estis prezentita vico da prelegoj pri diversaj eminentaj torunanoj, kiuj dum jarcentoj kontribuis al la pola kulturo kiel N. Kopernik, F. Skarbek, S. Linde, S. Kujot, W. Szymborska kaj aliaj. Kaptante la okazon mi proponis prezenton de nia "patro de Esperanta poezio" – Antoni Grabowski, kiu (ne ĉiuj esperantistoj scias pri tio) edukiĝis en la toruna gimnazio kaj en Toruń li renkontiĝis kun la inertnacia lingvo de L. Zamenhof. La nova prezidanto volonte akceptis la proponon kaj la 5-an de decembro en la Centro de Socia Dialogo, kie la Klubo kutimas renkontiĝi, mi prezentis la prelegon : "Eminenta lernanto de la toruna gimnazio – Antoni Grabowski - kemiisto, esperantisto kaj genia tradukanto". Kompreneble, plej multe mi parolis pri la tradukita *Sinjoro Tadeo* kaj pri interesiĝo de esperantistoj pri la verko de Adam Mickiewicz.

Je mia ĝojo, estis multaj demandoj kaj diskuteldiroj, la aŭskultantoj

interesiĝis ankaŭ pri Esperanto ĝenerale, pri la eblecoj lerni ĝin. Fine, mi estis petita prepari apartan prelegon pri la temo Esperanto kaj religio, utiligo de Esperanto en la katolika eklezio.

La okazintaĵo, laŭ mi, estas la atesto, ke nuntempe multaj homoj en diversaj medioj interesiĝas pri la internacia lingvo, opinias, ke ĝi devus esti pli larĝe utiligata. Laŭ miaj rimarkoj, la interesiĝo denove kreskas.

Ni, esperantistoj, por proksimigi "la finan venkon" ne tragapu la okazon, ni kolektu fortojn kaj enpaŝu kun niaj informoj diversajn mediojn.

Memortabulo al Antoni Grabowski en Wrocław



Robert Kamiński

Nova Eŭropa volontulo en Bjalistoko

En Bjalistoka Esperanto-Societo laboras Viktor Lagutin, nova eŭropa volontulo. Viktor partoprenas la projekton "Glokal"* Volontulado, kiu estas realigata kun subteno de Eŭropa Komisiono kadre de la programo Erasmus+. Li venis el Ĥabarovsko en Rusio kaj laboros kun esperantistoj ĝis somero 2019. Li parolas ne nur la rusan kaj Esperanton, sed ankaŭ la anglan kaj la hebrean.

* (de la angla nomo *glocal* - tutmonda kaj loka)



„Tra la Mondo”

Fondumo Zamenhof en Bjalistoko komencis novan agadetapon. Nova projekto de la Fondumo planas eldonon de kvaronjara gazeto - tri numeroj en la pola kaj unu en Esperanto. En la Esperanta eldono de "Tra la Mondo" estos la elekto de la plej bonaj tekstoj de polaj versioj. Dum Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj estis prezentita jam publikigita "nula" numero de la nova gazeto.

Krom la papera versio, estos ankaŭ havebla elektronika versio de la gazeto. La ĵurnalo estos kreita de amatoraj ĵurnalistoj, por kiuj oni organizos ĵurnalistajn laboratelierojn. La redakcia teamo, kiu ĉefe laboros per interreto, renkontiĝados



unuvoje jare, dum la Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, okazigataj en decembro.

Kion ni legos en "Tra la Mondo"? Interalie pri la aktivado en Podlaĥio, do pri eksterordinaraj homoj, vidindaĵoj, eksterordinaraj aferoj, allogaĵoj kaj interesaj lokoj en Podlaĥio. Legado de la ĵurnalo strebos pruvi, ke valoras viziti Białystok kaj vojaĝi ĉirkaŭ Podlaĥio, rigardante ne nur spurojn de Esperanto. Ĝi ankaŭ pruvos, ke la Esperanto-mondo estas malferma al ĉiuj homoj, ne nur tiuj, kiuj konas la lingvon. Kontakto kun la redakcio: fondumozamenhof@gmail.com



Stanisław Dobrowolski prezentas novan gazeton dum BZT.

Intervjuis *Mariusz Hebdzyński* de Pola Esperanto-Junularo

Daŭru Silvestro la tutan jaron!

Intervjuo kun **Lisa Morgenroth** – lingvistino kaj danc-ŝatantino el Lipsiko, Germanio, por kiu JES iĝis novjara tradicio.

Lisa, kiel vi ĉiujare sukcesas klarigi al via familio kaj ne-Esperantistaj amikoj, ke vi pasigos Silvestron sen ili?

Bonŝance, neniu forte plendas, ĉar dum jarfina feria paŭzo troviĝas tempo por ĉiuj kune kaj unuope. Ĉe mi, tiu pli familia festo estas Kristnasko, kaj Silvestron ni pasigas pli ofte eksterhejme, kun amikoj. Miaj proksimuloj bone scias pri mia Esperanto, do ili ne plu miras je mia elveturo, des pli, ke mi ĉiam tre ĝoje prirakontas la aranĝon post mia hejmvveno.



Viva muziko de la populara artisto Kaŝi povas facile dancigi!

Sur la foto Lisa dancas kun alia dancinstruisto, Spencer van der Meulen el Nederlando.

Fotis: Ivo Miesen

Kio estas la mirinda faktoro, kiu altiras vin tien ĉiam denove?

Post ripoza Kristnasko, mi havas sufiĉe da libera „cerbospaco” por plene malfermiĝi al novaj amikoj kaj ideoj. Tial mi venas al JES, ĉefe por renkonti eksterordinare malfermajn homojn, kun kiuj oni povas libere paroli sen antaŭjuĝoj. Dum tiu tempo gravas, ke neniu grupo restas inter si. Malgraŭ, ke la aranĝo enhavas substrekon de junularo en sia nomo, oni povas tie multe lerni de pli spertaj Esperantistoj, kiuj volonte venas kaj pliriĉigas la programon. Oni sentas sin parto de la granda Esperanto-familio!

Ĉu tiel emociplena periodo, kiel JES, estas do ĝusta tempo por fari novjarajn rezoluciojn?

Neniam mi venas kun pretaj rezolucioj, ili estiĝas nur dum la semajno. Unu el ili mi povas malkaŝi al vi, ĉar ĝi sonas same ĉiujare: teni kontakton kun nove ekkonitaj

amikoj, ankaŭ de foraj landoj, kaj daŭrigi la JES-ecan etoson dum la resto de la jaro. Mi pensas, ke en 2018 mi sukcesis!

Se ni parolas pri internacia amikaro – JES, estas ja kunlabora aranĝo de pola kaj germana junularoj. Kiel tio efikas?

Dank' al tio mi povas plue malkovri Pollandon, kaj Poloj havas bonan okazon viziti atrakciajn lokojn en Germanio – ne nur en la urbo de la aranĝo, sed ankaŭ dum multaj ekskursoj. Ĉi-jare ni vizitis interalie Frankfurton ĉe Odoro, kiu kune kun Słubice fariĝis simbolo de amikeco trans limoj. Krome, tiaj lokoj allogas grandan nombron da scivolemaj gastoj ankaŭ de aliaj landoj.

Pro la Silvestra Balo, JES ŝajnas esti tre taŭga spaco por popularigi vian hobion, kiu estas dancado. Kiel vi unue ekhavis ideon por tio?

La unuan fojon mi venis kun sufiĉe originala propono de kurseto de mezepokaj dancoj. Ĝi tiel ekplaĉis, ke mi kuraĝiĝis dum sekvaj jaroj transiri iom post iom al pli nuntempaj dancoj! (rido)

Kiel vi rekomendus al la legantoj de Pola Esperantisto veni al JES 2019 en Głuchołazy?

Karaj, vi certe interesiĝas pri io unika – kial ankaŭ vi ne venu kaj rakontu pri tio al aliaj ĉe JES?

JES – la *Junulara E-Semajno* – estas unu el la plej grandaj Esperanto-aranĝoj de la junularo. Ĉiujare ĝi okazas ĉirkaŭ novjaro dum unu tuta semajno, kutime en Germanio aŭ en Pollando. Organizas ĝin GEJ kaj PEJ (Germana kaj Pola Esperanto-junularoj). Ĉi-jare ĝi okazis la 10-an fojon, en Storkow, inter Berlino kaj Frankfurto ĉe Odoro. Partoprenis pli ol 200 gastoj.

Małgorzata Sopińska, Rafał Mościński, (lokaj organizantoj)

PEJ -semajnfino en Łódź

Kun granda ĝojo ni invitas vin al printempa renkontiĝo de esperantistoj en Łódź. Ĝi okazos en la fino de marto ekde la 29-a ĝis 31-a. Ni havas specialan loĝlokon por vi ĉe la strato je la nomo Ludoviko

Zamenhof. Sed tio ne estas fino de niaj surprizoj. Ni planas tre interesan ekskurson por ekkoni famajn lokojn en Lodzo. Ĉu vi scias ke “Lonely planet” rekomendas Łódź (en la dua loko) kiel unu en la plej vizitindaj urboj en la mondo?

Tio estos granda ŝanco por paroli kun aliaj esperantistoj, praktiki la ligvon kaj diskuti pri variaj temoj. Precipe ke ni planas sesion de mini-prelegoj. Ĉiu volontulo povos prepari la prelegon pri ajna temo. Se vi volus partopreni kaj decidus prelegi anoncu pri tio en la retpaĝo www.pej.pl. Tie baldaŭ aperos la detala programo.

Ni kore invitas vin!



Fronta flanko kaj korto de la tranoktejo ĉe la str. Zamenhova 13 en Łódź

Raportoj, rakontoj

Roman Dobrzyński

Piano kiel armilo Sendependa Pollando 100 j.

La fiasko estas orfa, la sukceso havas multajn patrojn. La restarigo de sendependa Pollando antaŭ unu jarcento estis granda sukceso de la pola popolo, revanta pri tio, kaj batalanta por tio dum 123 jaroj. La 11-an de novembro 1918 Józef Piłsudski anoncis la polan sendependiĝon kaj per tiu ĉi fakto li iĝis ĝia simbolo. Sed li estis nur *primus inter pares* - la unua inter egaluloj, kies meritoj estas same gravaj. Mi volas prezenti unu heroon el la plurnoma listo. Li estis nek politikisto, nek soldato, sed komponisto kaj virtuozo de piano: Ignacy Paderewski.



15-jara Ignacy Paderewski
kun patro

Paderewski naskiĝis 1860 en la regiono de Podole, (nun parto de Ukrainio), en la malriĉiĝinta nobela familio. Lia patrino Poliksena mortis tuj post la nasko kaj la patro Jan estis malliberigita pro la patropreno en la kontraŭrusa insurekcio (1861-63). La bebon vartis lia onklino. La patro post la forlaso de malliberejo trovis ĉe sia filo muziktalenton kaj veturigis lin al Varsovio, kie li komencis studi en la renoma Muzikinstituto. Karakterizis lin individueco, memfido, kaj konfliktemo, sed ankaŭ diligenta studemo. En la aĝo de 18 jaroj Ignacy Paderewski fariĝis diplomita pianisto pro bravura interpreto de la *Koncerto a-minora* de Edvard Grieg.

Rezulte de tiu ĉi sukceso oni proponis al li postenon de instruisto en la Muzikinstituto. Baldaŭ li edziĝis al sia studentino Antonina kaj planis daŭrigi modestan, sed stabilan familian vivon. Sed la blinda sorto forte lin suferigis. Lia edzino mortis dum naskado.

Sekve de tiu ĉi familia tragedio kaj manko de entuziasmo por sia instruista laboro Paderewski forveturis al Berlino, kie li dum du jaroj studis la arton de komponado. Tie li konatiĝis kun korifeoj de la okcidenteŭropaj muzikistoj, interalie kun Johan Brahms. Liaj unuaj komponaĵoj estis sukcese venditaj. La someron 1884 li pasigis en Zakopane kaj konatiĝis kun la internacie fama aktorino Helena Modrzejewska. Ŝi decidis rapidigi la karieron de la talenta junulo kaj organizis pare kun li koncertojn en Krakovo, kiuj plenigis lian daŭre malplenan poŝon. Kun la gajnita mono Paderewski translokiĝis al Vieno kun la celo perfektigi en la pianoludo ĉe la eminenta pola pedagogo, Teodor Leszetycki. Tiu ĉi majstro dubis ĉu lia samnaciono, jam 24-jara sukcesos akiri laŭrojn. Sed Paderewski sukcesis. Lia diplomkoncerto en Vieno estis entuzjasme akceptita. Naskiĝis nova virtuozo de piano.

Ekde 1888 Ignacy Paderewski recitalis en Eŭropa kontinento. La tutan jaron 1890 li pasigis en Anglujo, en 1891 konkeris por kelkaj jaroj Usonon, kie li ne nur famiĝis, sed ankaŭ riĉiĝis.

Dum sekvaj jardekoj Paderewski triumfe turneis tra la mondo, Tiutempe ne ekzistis amaskomunikiloj kiel nun, koncertoj okazadis fronte al ĉeestanta publiko, la artisto nur vid-al-vide povis fariĝi ĝia idolo. Danke al sia famo kaj karisma personeco la pola virtuoza amikiĝis kun multaj muzikamantoj, komponistoj kaj muzikistoj, sed ankaŭ kun eminentuloj el diversaj vivosferoj, interalie kun politikistoj. Historiaj cirkonstancoj kaŭzis,



ke precipe grava montriĝis lia konateco kun Thomas Woodrow Wilson.

Unua koncerto en Parizo

Tiu ĉi elstara prezidento de Usono decidis januare 1918 alianci sian landon flanke de la kontraŭ-germana

koalicio surbaze de la deklaro konata kiel „14 punktoj de Wilson”. Sekve de la strebado de Ignacy Paderewski en la 14-a punkto estis metita la postulo restarigi sendependan polan ŝtaton. Pli frue tiu ĉi fama artisto iniciatis en Usono kampanjon por sendependiĝo de Pollando. Rezulte de la interveno de la usona armeo en la unuan mondmiliton ĝi finiĝis venke al la aliancanoj, kio kreis favoran cirkonstancon al poloj reakiri sian sendependan ŝtaton. Proklamis ĝin Józef Piłsudski la 11-an de novembro 1918. Paderewski ĉeestis en Varsovio kaj en januaro 1919 fariĝis ĉefministro kaj ministro pri eksterlandaj aferoj de la dua Pola Respubliko.

La Versajla Packontrakto (1919) konfirmis la sendependecon de Pollando kaj subskribis ĝin Ignacy Paderewski. Ĝi entenis kondiĉon, ke en kelkaj teritorioj, loĝigitaj de poloj kaj germanoj, estos aranĝita plebiscito pri aparteno de liaj loĝlokoj al Pollando aŭ Germanujo. Ekestis danĝero, ke la germana minoritato pli bone organizita kaj helpata de sia ŝtato gajnos la plebiscitan baloton. Silezianoj kaj grandpoloj devis sian aliĝon al Pollando elbatali per milita leviĝo. Ignacy Paderewski ekludis gravan rolon kiel politikisto kaj patrioto. Per sia pasia parolado en Poznano li iniciatis en Grandpolujo la venkan insurekcion. Fine de 1919 Paderewski demisiis, ĉar komenciĝis nova fazo de politikaj komplikajtoj, kiujn fronti li jam ne plu scipovis. Temas pri la milito de Pollando kontraŭ la bolŝevisma Rusujo.

Lenin kaj Trocki celis vastigi sian revolucion al okcidenta Eŭropo „super la kadavro de Polujo”. Unuaj bataloj komenciĝis februare 1919. Ĉefkomandis ilin Józef Piłsudski. La milito longiĝis, bolŝevistoj progresis.

Meze de 1920 la Ruĝa Armeo proksimiĝis al Varsovio. La 15-an de aŭgusto Józef Piłsudski realigis brilan operacion. La pola armeo sukcesis ĉirkaŭi la taĉmentojn de la marŝalo Tuchaczewski, kaj disbatis ilin. La milito, finiĝinta per grandioza venko de la pola armeo, savis la okcidentan Eŭropon de la komunisma revolucio, kies ekflamo plej forte endanĝerigis Germanujon.



Ignacy Paderewski kun Józef Piłsudski

Ignacy Paderewski estis dum kelka tempo reprezentanto de Pollando en Ligo de Nacioj, sed iom post iom revenis al sia artista agado kaj denove ludis en la plej gravaj koncertejoj de Eŭropo, Ameriko kaj Aŭstralio. Same grava estis por li komponado. En siaj verkoj li ofte aludis la polan muzikon, interalie la folkloron de Tatroj. Li komponis multajn kantojn por poemoj interalie de Adam Asnyk kaj Adam Mickiewicz. La plej granda verko de Paderewski estas la opero *Manru*, kies libreto rakontas la enhavon de la romano de Józef Ignacy Kraszewski *Kabano ekster la vilaĝo*. Tiu ĉi opero, akuzanta maltoleremon, entenas citaĵojn el la cigana folkloro.

Ignacy Paderewski elektis Svisujon kiel sian konstantan vivlandon. Post la eksplodo de la dua mondmilito li forveturis al Novjorko. Tie li mortis la 29-an de junio 1941. En sia testamento li esprimis deziron eterne ripozi en Pollando. Nur la 5-an de julio 1992 liaj cindroj estis lokitaj en sarkofagon, kiu troviĝas en la kripto de la katedralo de Sankta Johano en Varsovio.

Poliglotoj venis al Slovenio

Antaŭ la tempo de interreto kaj amaskomunikiloj, poliglotoj estis soluloj, kiuj mem lernis aliajn lingvojn kaj pri ilia laboro homoj ofte opiniis, ke ĝi estas ekscentra aŭ neklarigebla.

Interreto ŝanĝis tion, farante geografion ne gravan kaj unuigante lingvajn amantojn. Krom facile haveblaj informoj pri aliaj landoj kaj kulturoj, ili nun havas rektan aliron al la uzantoj de lokaj lingvoj kaj al poliglotoj, reprezentantaj centojn da lingvoj.

Novaj lingvaj servoj kaj sociaj amaskomunikiloj kondukis al kreado de konscia, kunlabora interreta komunumo.

La unua neinterreta renkontiĝo de poliglotoj okazis en Budapeŝto, dum la konferenco Polyglot, en la jaro 2013. Tie renkontiĝis lingvemuloj el la tuta mondo. Multaj, kiuj estis aktivaj en la enreta lingvokomunumo, nun povas dividi spertojn, diskuti pri metodoj de lingvolernado, praktikoj kaj lingvaj kapabloj, kaj interŝanĝi ideojn.

Ekde tiu unua okazaĵo, la lingva komunumo de You Tube-kreantoj, instruistoj, tradukistoj, interpretistoj, verkistoj kaj entreprenistoj daŭre kreskas. Ĉiujare pli kaj pli da homoj, kiuj amas lingvojn, renkontiĝas, dum internaciaj okazaĵoj, por plibonigi la kvaliton de sia eduka sperto kaj nivelon de poliglotoj tutmonde.



Panoramo de Ljubljana

Esperantistoj ankaŭ partoprenas en kunvenoj kaj konferencoj de poligotoj. La programoj de la kunvenoj prezentas la internacian lingvon kaj ebligas partopreni en Esperanto-laboratelieroj.

Ĝis nun mi havis la ŝancon partopreni en kelkaj tiuspecaj eventoj. Je la lasta semajnfino de oktobro 2018, kune kun kelkcent da lingvaj entuziasmuloj, mi kun Marketa partoprenis en la konferenco de plurlingvaj-parolantoj *Polyglot 2018* en Ljubljana – la ĉefurbo de Slovenio. La temo de la konferenco estis "Diverseco en Lingvo".

Vendrede vespere okazis solena malfermo de la konferenco. Partoprenantoj ĝuis plurlingvan koncerton de Jessie Ann de Angelo. Sabate kaj dimanĉe okazis prelegoj kaj atelieroj pri diversaj lingvoj. Parto de la konferencanoj parolis la internacian lingvon. Kelkdek aliaj verŝajne ŝatus lerni ĝin, ĉar kun interesiĝo ili partoprenis en ateliero de Judith Mayer el Germanio "Fenestro al Esperanto". Okazis ankaŭ ateliero "Esperanto por progresantoj" de Peter Baláž. Inter aliaj kontribuantoj de la konferenco, kiu parolis Esperanton, menciindas Richard Simcott – hiperpoligloto el Britio kaj la ĉefa organizanto de la konferenco, Lýdia Machová, slovaka instruistino de lingvoj, kiu rakontis pri bezono havi sistemon lernante lingvojn kaj konsilis, kiel trovi motivadon por la efika lernado. Seán Ó Riain el Irlando rakontis pri la lingva akcelilo – dujara programo por la jaroj 2018-2019, financata de la Eŭropa Komisiono, kiu celas disvolvi lernmaterialojn por instruistoj, bazitaj sur propedeŭtiko de Esperanto, por esti uzataj kun lernantoj en la finaj du jaroj de bazlernejo en elektitaj landoj, kaj Elisa Polese -profesia lingva instruistino specialigita pri plurlingva instruado. Ni renkontiĝis kun kelkaj samideanoj el Usono, Bulgario, Germanio, Kroatio; ĉeestis ankaŭ aliaj el diversaj landoj, sed pro limigita tempo, ni ne sukcesis paroli kun ĉiuj.



Plaĉis al mi lingvaj ludoj - la arto rakonti frenezajn rakontojn uzante ĵetkubojn kaj ateliero pri la slovena lingvo "Slovena en la poŝo" - kvizo kaj bildoludado. Okazis prelegoj pri diversaj lingvoj, inter alie pri la okcitana, romana, itala, dialekto furlan, portugala, hungara, la vietnama, pirahã;

Interesaj estis prelegoj pri multlingvismo, diversaj skribsistemoj, dulingvaj tekstoj, Braille-sitemo por nevidantoj kaj aliaj. Oni povas rigardi kelkajn filmitajn prelegojn en la videospekto "jutubo".

Dum la konferenco funkciis E-libroservo. Mi aĉetis tie eldonitan ĉi-jare interesan krimromanon "Averto de murdo" de Julian Modest. Henri-Sébastien Erhard el Francio, aŭtoro kaj kreinto de tri multlingvaj tabulludoj, eldonitaj fare de la eldonejo Assimil, prezentis i.a. la ludon "Famili Linguo", kiu aperis ankaŭ esperantlingve.

Antaŭ la konferenco, vendrede, ni renkontiĝis kun samideanoj Janez Jug, biblioteka kunordiganto en la Universitato de Ljubljana (la plej malnova en Slovenio) kaj samtempe estro de la loka E-klubo kaj kun Tihomir Lovrić, kroata esperantisto kaj talentita desegnisto el la urbo Rijeka. Poste ni ĉiuj alvenis al PEN-klubo de slovenaj verkistoj, kie ĉirkaŭ tridek samideanoj kaj ankaŭ ne-esperantistoj el Slovenio, Italio, Kroatio, Irano, Ĉeĥio, Pollando, kaj aliaj landoj aŭskultis interesan prelegon de d-ro Giorgio Silfer pri historio de E-literaturo. Samideano Jazen interpretis ĝin el Esperanto al la slovena. La preleganto interese rakontis pri diversaj kulturoj kaj esperantigitajn verkojn ekzemple Hamleto, Infero, Biblio menciante ankaŭ pri Faraono de Bolesław Prus kaj Sinjoro Tadeo de Adam Mickiewicz, kies liaopinie altnivela kaj bonstila traduko estis grava en la unua periodo de Esperanto-literaturo. Dum publika interparolo kun la preleganto mi demandis pri aliaj literaturaĵoj kaj proponis legi esperantigitajn verkojn "Sub la jugo" de bulgara verkisto Ivan Vazov kaj la finna nacia epopo "Kalevala", kiuj plaĉis al mi.

Krom lingvaj okupoj mi ankaŭ turismis, Du tagoj antaŭ la konferenco mi vojaĝis kun Markéta al belaj lagoj Bled kaj Bohinj en la Nacia Parko de Triglav kaj ni vagadis apude tra montaro.

En Ljubljana ni promenis tra la draka ponto, ĉe kiu sidas skulptitaj verdaj drakoj, apud la teatro, ĉe kies horloĝturo je ronda horo moviĝas lumigitaj figuroj akompane de muziko kaj venis al la kastelo sur monteto, kie ĉe korto ni ekvidis vagantan vulpon kun longa vosto. Estis agrabla surprizo renkonti ĝin. Laŭ la kelnero de la kastela restoracio, tiu bela besto venas tien ĉiu-vespere. Verŝajne ĝi loĝas en la densa arbaro apud la kastelo. Ni malsupreniris en la urbon kaj ĝuis belaspektantan, nokte lumigitan

ponton ĉe la rivero Ljubljanica. Apud la lago mi denove spertis kiom multe gravas koni lokan lingvon kaj atente legi surskribojn. Post longa promenado tra la ravino Vintgar al la akvofalo Šum mi soifis. Tial revenante al la hotelo vespere en loka nutraĵvendejo mi aĉetis likvaĵon en botelo kun bildo de pomoj sur etiketo. Mi malŝaltis lumon en la hotela ĉambro, enlitiĝis kaj englutis plenbuŝe sukcon el la botelo. Tuj mi elsaltis el la lito kaj kuris al la banĉambro ĉar ne eblis fortrinki la “sukcon”, ĝi estis ege acida! Tiam mi finfine tralegis surskribon sur la botelo: “*domaĉi naravni jabolĉni kis*”. Ĝi montriĝis esti “*la hejma natura vinagro de pomoj*”. Do, mi havis lecionon! Venontfoje mi atente kontrolos kun vortaro kion mi aĉetas.

Resume, Slovenio estas bela lando, kie okazas partoprenindaj aranĝoj - mi instigas vin veni tien kaj renkonti lokajn samideanojn. Raportis Adam Wilkus

Pri la konferenco vi povas legi en anglalingva retpaĝo: (www.polyglotconference.com)



Roman Dobrzyński

Litvo patrujo mia... 2-a parto

La katedrala sonorilejo estas postrestaĵo de unu el defendturoj de la urba remparo. La arkitekto Gucewicz, surkonstruante la klasicisman turon, plialtigis la sonorilejon ĝis 57 metroj. Kiel aparte staranta turo, ĝi konsistigas integran elementon de la katedrala komplekso kaj donas al la tuto mirindan aspekton. El la plej alta etaĝo de la sonorilejo oni spektas belegan panoramon de la ĉefurbo, interalie la bastionon sur la monto. Ĝi estas la plej malnova historia objekto en Vilno. Starigis ĝin la duko Gedimino, kiu ludis gravan rolon en la unuigado de litovaj teroj en la komunan ŝtaton. Gedimino translokigis sian korton al Vilno en la 1323-a jaro. Alia arkitektura mirindaĵo de Vilno estas la preĝejo al Petro kaj Paŭlo, konstruita en la 17-a jarcento, kiel fondaĵo de la magnato Nikolaŭo Paco. Sur ĝia fasado okulfrapas latinlingva surskribo: *La reĝino de paco donu al ni pacon*, kiu bonintence asocias kun la nomo de la fondinto.

Polaj vizitantoj de Vilno nepre vizitas la tombejon de Rossa, kiel unu el la kvar naciaj nekropoloj. Unue oni aliras horizontalan blokon el la nigra granito kun ĉizitaj vortoj: *La patrino kaj la koro de ŝia filo*. Ĝi estas tombo de

Maria Piłsudska kaj la koro de Józef Piłsudski, kies tuta korpo estis sepultita en Krakovo. Józef Piłsudski multe kontribuis al reakiro de la sendependeco de Pollando en la 1918-a jaro. Apude troviĝas simbolaj tomboj de liaj soldatoj, pereintaj en la milito kontraŭ la rusa bolŝevismo en la jaro 1920. La nekropolo de Rossa fondiĝis en la 1800-a jaro. En la komunisma epoko ĝi suferis malzorgon kaj partan detruon. Tamen, ĝi daŭre estas rekonata kiel galerio de la sepulta arto. Precipe ravas la modernisma surtomba monumento de Iza Salmonowicz, mortinta junaĝe en 1911.

Trakai

Ni forlasis Vilnon per buso, veturante kune kun niaj novaj litovaj geamikoj al Kovno, la alia urbo forte ligita kun Adam Mickiewicz. Survoje ni paŭzis en Trakai. Tiu ĉi loko estas konsiderata ikono de litovaj pejzaĝoj. Trakai estis la ĉefurbo de Litovio, tiutempe la lasta pagana lando de Eŭropo. La kristaniĝo de Litovio kaj ĝia unio kun Pollando en 1386, savis ambaŭ monarkiojn kontraŭ la ekspansio de Teŭtona Ordeno. La litova duko, Vytaŭtas, komence de la 15-a jarcento transformis la surinsulan fortreson en grandiozan rezidejon. Post lia morto, Trakai iĝis ripozejo, volonte vizitata de la polaj reĝoj, kiuj ĝuis ankaŭ la titolon de litovaj dukoj. La kastelo estis detruita dum militoj en la 17-a jarcento. Ĝian reskonstruon iniciatis la pola registaro dum la intermilita tempo. La aktualan staton de la grandioza komplekso, oni ŝuldas al Litovio, sendependiĝinta en 1991.



En Trakai ankoraŭ loĝas karaitoj, la tatardevena popolo, konfesanta la mosean religion kaj daŭre fidela al sia tradicio. Venigis ilin ĉi tien la Duko Vytaŭtas, kiel sian gvardion, komence de la 15-a jarcento.

Kovno

La rivero Neris trapasas Vilnon kaj, post cent kilometroj, ligas sin kun la granda Nemano. En tiu ĉi angulo naskiĝis Kovno. Ambaŭ riveroj certigis al tiu urbo naturan gardlimon kaj utilan akvovojojn. La komenco de defendkonstruaĵoj tuŝas la 13-an jarcenton, kiam Litovio troviĝis en la stato de la feŭda dispartigo je pluraj duklandoj. Ili batalis inter si pri hegemonio, sed alfrontis samtempe la grandan danĝeron flanke de Teŭtona Ordeno. Tiel nomataj kruckavliroj, sub la preteksto de kristanigo, ekstermis la ĉebaltan etnon de prusoj, kaj plu ekspansiis orienten. Kontraŭ ili litovoj konstruis fortresojn.

El birda perspektivo valoras admiri Kovnon kun ĝia mezepoka kastelo, renesanca urbodomo, nomata „blanka cigno”, kaj gotika katedralo, kies interno estas pure baroka. En la ekstera muro de la katedralo estas sepultita la pastro Aleksander Dąbrowski, litove Dombrauskas. Li kontribuis multe la renovigon de la literatura litova lingvo. Sed li famiĝis ankaŭ en la Esperanto-movado, kiel persono, kiu sendis al Ludoviko Zamenhof la unuan leteron en la lingvo internacia.



La kreinto de Esperanto estis forte ligita kun Kovno, la naskiĝurbo de lia edzino Klara. En la nuna Zamenhof-strato troviĝas domo de Aleksandro Zilbernik, la bopatro, kiu financis la eldonon de la „unua libro”. La domo nun apartenas al Litova Esperanto Asocio, kiu ne havas rimedon por renovigi ĝin.

Mi filmas la grandan teamon de ambaŭlandaj partoprenantoj. Mirigis min amika rilato inter litovaj kaj polaj mutuloj, kiuj lerte interkompreniĝas per la gesta lingvo. La tuta grupo eniris la Urbodoman Placon kun la baroka preĝejo, konstruita fare de la Ordeno de Jezuitoj. Ili venis al Litovio en la 17-a jarcento celante protekti la orientan katolikan parton de Eŭropo kontraŭ la ekspansio de la protestanta reformacio. Kiel sian armilon jezuitoj uzis bone organizitan eduksistemon. Ĉe la preĝejo funkciis elita gimnazio. En la jaro 1773, la jezuita ordeno estis malfondita, rezulte de tio la gimnazio fariĝis publika lernejo. Ĝia konstruaĵo ekzistas ĝis nun. En la dua etaĝo ekloĝis Adam Mickiewicz, en la 1819-a jaro. Li instruis la polan lingvon dum preskaŭ kvar jaroj. Post la jaro 1991, Litovio, kiel sendependa ŝtato, redonis al jezuitoj ĉiujn nemoveblaĵojn. Denove funkcias la jezuita gimnazio. Ĝia lernantino Marija Banajtite diris al mia kamero Esperante: *Se mi naskiĝus antaŭ 200 jaroj, mi povus esti lernantino de Adam Mickiewicz.*

En Kovno Mickiewicz estas personocelibrata. Lia muzeo troviĝas en la malfrugotika konstruaĵo el la fino de la 15-a jarcento. Oni nomas ĝin la Domo de Perkuno. Temas pri la pagana idolo de fulmotondroj, kies templo tie ĉi troviĝis. La muzeo posedas riĉan kolekton de verkoj de Mickiewicz, tradukitaj en fremdajn lingvojn. Al la plej adekvataj tradukoj de „Sinjoro Tadeo” apartenas ĝuste la litova, belorusa, ĉeĥa kaj Esperanta. Ili ĉiuj fidele redonas la enhavon de la verko kaj ĝian dektrisolaban metrikon. En la muzeo, nia grupo surprize ĝuis lernadon de la mezepoka danco. En Kovno estas alia muzeo, dediĉita al Jonas Maĉiulis, ĝenerale konata kiel Maironis. Li estis eminenta poeto kaj kunkreinto de la moderna litova literatura lingvo. Kiel politikisto, li multe kontribuis al la renaskiĝo de sendependa Litovio, en la jaro 1918. Tiu muzeo prezentas galerion de litovaj merituloj. Inter ili ne mankas loko por Adam Mickiewicz, kiu verkis en la pola lingvo, sed multfoje prezentis litovajn temojn. Pro tio li meritas la titolon: „Poeto de du landoj”. En sia poemo „Graŝyna” (legu Graĵina) li lasis sentimentalajn rememoron pri Kovno, kie li loĝis kvar jarojn kun paŭzoj:

*Mi vidis ĉarman valon apud Kovno,
Kie nimfaj manoj printempe, somere
Brodas herbejon per bunta floraro.
Ne ekzistas valo pli bela surtere...*

La antaŭlastan tagon de la estado en Litovio, ĉiuj partoprenantoj pasigis en la urba parko, kie ili multe laboris. Pri kio? La litova organizantino de la aranĝo, Aida Ĉizikaite, respondis al mia kamero:

Ni realigas internacian projekton. Renkontiĝis gejunuloj de Pollando kaj Litovio. Nia temo estas la poeto de du landoj, Adam Mickiewicz. Ili iris laŭ liaj spuroj en Vilno kaj Kovno. Ni vidas litovajn gejunulojn, kiuj inspiritaj de la vivo kaj verkoj de la poeto, provas desegni lian portreton.

La lastan tagon, en la kunaboranta lernejo, estis aranĝita ekspozicio de konkursaĵoj. Halina Komar kaj Aida Ĉizikaite, kiuj estris la tutan projekton, anon-cis rezultojn de la konkurso kaj en-manigis premiojn. Fakte la venkintoj estis ĉiuj partoprenantoj kaj Adam Mickiewicz mem, sub kies egido interamikiĝis litovoj kaj poloj. Ludoviko Zamenhof estus ne malpli kontenta.



Aida Ĉizikaite kaj Halina Komar enmanigas diplomojn

Pri kio ni aŭdas

Jean Marc Leclercq

Mi neniam kredis je „Kristnaska Paĉjo”

Mia patrino tiom suferis, kiam ŝi eksciis, ke la „Kristnaska Paĉjo” ne ekzistas, ke ŝi decidis ne "trompi siavice" (laŭ tio, kiun ŝi diris) proprajn infanojn. Mia fratino do ankaŭ neniam kredis je la magio de Kristnasko, en nia lando, kie komercaĵoj plejparte anstataŭigis la religian tradicion valoron de tiu festo, kaj kie la ruĝa donacportanto ludas la ĉefan rolon.

Kiam mi parolas pri tiu nekredo, la homoj ĉirkaŭ mi kompatas, diras, ke mi havis malbonŝancon, ke mi maltrafis ion bonan, kiu povintus beligi mian infanaĝon. Laŭ mi, mi ne estas tiom kompatinda homo. Mi ne povas bedaŭri ion, kion mi tute ne konis, kaj eĉ male, mi sentis min en tiu tempo plivalorigita, ĉar mi estis "la infano ĉe la plenkreskula flanko", tiu, kiu konas la grandan sekreton de la vivo, laŭvorte: ke la Kristnaska Paĉjo ne ekzistas!

Mi ankaŭ neniam perfidis la sekreton, rezistis la volon rakonti tion al amikoj. La plenkreskuloj konfidis al mi unu mision, kaj mi estis ĝoja plenigi ĝin. Mi eltenis ĝis la fino kaj la granduloj povis esti fieraj de mi.

Sed tamen, evidentas, ke tio ŝangis la vidpunkton, kiun mi havas ĝis nun al mondo ĉirkaŭ mi. Estante konscia, ke tio estis granda mensogo, mi klare vidis ĉiujn strebojn, kiujn la plenkreskuloj elpensis por kredigi je ekzisto de iu, kiu fakte estas nur mito. Eĉ televido kaj gazetoj partoprenis. Mi do frue komprenis la funkcion de tio, kion ni povas nomi manipulado.

Certe vi opinios, ke la vorto "manipulado" estas tro forta, sed kiel nomigi la elpenaĵojn, uzitaj por doni unu iluzion al milionoj da personoj? Sufiĉas ne konsideri la negativan signifon de la vorto, ĉar temas nur pri fabelo por infanoj. Estis interesa vidi tion ene de la afero.

Restis al mi unu malfido sufiĉe grava al la publika alparolo ĝenerale. Mi bone scias, ke oni povas kredigi ion malveran por ricevi politikajn avantaĝojn de la situacio, al granda nombro da personoj, kiuj estos certaj, ke tio estas vera. Tio, kompreneble, gvidis min al unu pensmaniero pri la organizado de la socio kaj helpis min konstrui mian propran filozofion. La ĉefa trajto de ĝi estas ne fidi aŭtomate iun, sed kontroli, ĉu tiu persono ne influis sian rakonton pro personaj celoj au eĉ nevole pro emociaj sentoj.

Fojfoje la nefabeloj de Kristnasko povas havi neantaŭvideblajn konsekvencojn.

Mark Fettes, Prezidanto de UEA

Nova membrokampanio de UEA

Karaj amikoj:

Mi skribas, por peti vian helpon en la membrokampanjo de UEA por la jaro 2019. Niaj aliĝintaj landaj asocioj estas la plej gravaj fontoj de novaj individuaj membroj de nia Asocio. Ju pli da tiaj membroj ni havas, des pli bone UEA povas reprezenti la tutmondan esperantistaron.

Kaj ne temas pri ordinara jaro. En Lisbono la Komitato reformis nian membrisistemon, tiel, ke ekde la venonta jaro la kategorioj “Membro kun Gvidlibro” kaj “Membro kun Jarlibro” anstataŭiĝas per la nova kategorio “Baza Membro”. Ni bezonas vian helpon, por klarigi tiun ŝanĝon al viaj membroj.

Fariĝi “baza membro” de UEA estas maniero montri sian solidarecon kun la mondvasta komunumo de esperantistoj. La kotizoj por baza membreco estas ligitaj al la relativa riĉcnivelo de la diversaj landoj, ekde nur 2 eŭroj en la plej malriĉaj landoj ĝis 44 eŭroj en la plej riĉaj. Ĉiu esperantisto, kiu aliĝas laŭ la plej alta tarifo, samtempe subtenas la membriĝon de homoj kun multege malpli da rimedoj. Tiu sistemo celas esti pli justa kaj inkluziva.

Plia novaĵo estas la rabatoj por junuloj. Ĝis la aĝo de 19 jaroj, homoj povas aliĝi je nur kvarono de la kutima kotizo (t.e. 11 eŭroj en la plej riĉaj landoj). Inter la aĝoj 20 kaj 25, la kotizo estas duono de la kutima. Ni tre esperas, ke vi helpos nin diskonigi tiujn rabatojn inter la junaj esperantistoj en via lando.

Bazaj membroj ricevas ĉiujn servojn kaj rajtojn de membreco, inkluzive de rabato por la Universala Kongreso. La informoj en Jarlibro estos alireblaj elektronike per la nova reta membrospaco de UEA, al kiu iom post iom aldoniĝos novaj funkcioj. Papera eldono de la Jarlibro estos daŭre mendebla, kontraŭ aldona pago.



La kategorio Membro-Abonanto restas pli-malpli senŝanĝa. La kotizo estas tiu de Baza Membro plus 30 eŭroj por ricevi la paperan eldonon de la revuo *Esperanto*. La reta eldono estos legebla por ĉiuj membroj.

Ankoraŭ eblas fariĝi Dumviva Membro de UEA. Ekde la nova jaro, la kotizo

por tio egalas al 30-oblo de la koncerna jarkotizo (de Baza Membro aŭ de Membro-Abonanto). Ĝis la fino de 2018, oni ankoraŭ povas fariĝi Dumviva Membro je la malnovaj tarifoj (25-oblo).

La kialoj fariĝi individua membro de UEA restas la samaj. Ne temas nur pri la konkretaj servoj, kiujn oni ricevas kiel membro. Temas pri tio, ke

UEA estas la sola Esperanto-asocio, malfermita al esperantistoj en ĉiuj landoj, ĉiuj tendencoj, ĉiuj vivsituacioj. Nia Asocio estas konkretigo de la vizio de D-ro Zamenhof, pri la mondo, en kiu homoj renkontiĝas, amikiĝas, kunvivas kaj kunlaboras kun homoj. Eĉ en la plej riĉaj landoj, la kosto de baza membreco estas malpli ol unu eŭro semajne. Tio estas malgranda investo en la granda idealo.

Niaj landaj asocioj estas kolonoj de nia Asocio, videblaj pruvoj de nia tutmondeco. Bonvolu helpi nin montri tion ankaŭ per la kreskigo de nia individua membraro! Eĉ 10%-a kresko en via lando estos bela indiko pri la solidareco de viaj samlandanoj kun aliaj samideanoj tra la terglobo.

Bjalistoka Esperanto-Societo

Rezulto de la Literatura Konkurso 2018

La 2-an de novembro 2018, la konkursa komisiono, fondita por taksi verkojn de la 8-a Literatura Konkurso „Valoras lerni Esperanton, ĉar...”, kiun konsistigis:

- Eligiusz Buczyński – prezidanto, reprezentanta Podlaĥian Libraron
- Iwona Kondraciuk – komisionano, reprezentanta Bjalistokan Esperanto-Societon

pritaksis 22 verkojn, prezentitaj ĝustatempe.

La komisiono decidis premii:

- per la unua premio la verkon *Am-Lingvo* de Éva Baloghne Fodor.

- per la dua premio la verkon *De Cambodunum al Danubo* de Johann Andreas Pachter.

- per la tria premio la verkon *Zamenhof w Grodnie* de Andrzej Tichomirow.

La organizantoj dankas al ĉiuj partoprenintoj kaj deziras sukcesojn en la plua verkado. La premioj (legiloj de bitlibroj), diplomoj kaj Bjalistokaj Kajeroj kun ĉiuj konkursaj verkoj estos dissenditaj per poŝto al ĉiuj partoprenintoj, kiuj ne ĉeestis la 19-ajn Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn.



Vizitindaj lokoj

Adam Wilkus

Marŝe kaj legende en la Montaro Karkonosze

La montaro Karkonosze, nomata ankaŭ Gigantomontaro, estas la plej alta montaro en la ĉeno de la montaro Sudety kaj ĝi troviĝas en la limregiono de Ĉeĥio kaj Pollando. Grandan parton de ĝi kovras piceaj arbaroj. Vivas tie multaj birdoj, ekzemple la blankvosta maraglo kaj eksterordinaraj mamuloj - muflonoj, niktoreŭtoj, lutroj, ondatroj kaj aliaj.

Ĉiujare, Silezia Esperanto-Asocio, je la fino de somero, organizas *Esperanto-feriadon* en la bela ĉirkaŭaĵo de la Sudety-montaro. Ĝi okazis jam en la famaj polaj ripoz- kaj kuraĉlokoj - Karpacz, Międzygórze, Kudowa-Zdrój, Szczawno-Zdrój, Duszniki-Zdrój kaj Łądek-Zdrój, kiuj situas prosime al la montaro Karkonosze..



Pinto de la monto Śnieżka (foto: Youtube.com)

Pasintaŭtune mi supreniris la ĉeliman montpinton *Śnieżka* (Neĝulino) -1603 metroj super marnivelo - la plej altan pinton en la montaro Karkonosze. Ĝi havas interesan formon, kiu similas al piramido kaj ankaŭ ĝi estas la plej alta montopinto de Ĉeĥio. Ĉe la pinto laboras pola meteorologia observejo. Supre de la pinto, apud ĉeĥa poŝtofiĉejo, troviĝas

ankaŭ ligna kapelo, dediĉita al la Sankta Laŭrenco, kien homoj pilgrimadas jam ekde jarcentoj. Tien eblas veni per du telferoj. Rekten el la ĉeĥa urbeto *Pec*, tra la monto *Růžová hora* (1396m), aŭ, el la pola flanko, de la urbeto *Karpacz*, ĝis la montopinto *Kopa* (1375 m) kaj sekve perpiede, laŭ la turisma itinero apud *Dom Śląski* – la plej ofte vizitata gastejo en la montaro.



En Karpacz mi vizitis unikan preĝejon el ligno, konstruita de Vikingoj en la 12-a jarcento, en la norvegia loĝloko *Wang* (de kiu devenas ĝia nomo) kaj transportita al Karpacz en 1841.

Preĝejo Wang en Karpacz (foto: <http://www.gorypolskie.eu>)

En la Gigantmontaro mi preterpasis rokegojn en eksterordinara formo, en Esperanto nomataj *La Pilgrimoj*, *La Tagmezosuna ŝtonego*, kiuj situas ĉe la itinero nomata *vojo de la ĉeĥa-pola amikeco*. Mi

preterpromenis belajn laĝetojn: *La Granda Laĝeto* kaj *La Malgranda Laĝeto*, kreitaj dum la glaciepoko.

En la montaro, je alteco 1386 m, troviĝas la fonto de la rivero *Elbo*. Mi venis ankaŭ al belaj akvofaloj *Kamieńczyk* kaj *Szklarka* kaj al la kastelo *Chojnik* sur monteto en Sobieszów – nun kvartalo de la urbo Jelenia Góra. Alvenante al la montaro tra la urbo *Jelenia Góra*, mi vizitis ŝtonegon kun memortabulo omaĝe al L. Zamenhof kaj Esperanto, kiu ekde 1948 troviĝas en la urba parko.

Ĉi-vintre mi venis al apudmontara urbeto *Szklarska Poręba*, de kie mi veturis per telfero al la pinto *Szrenica* (1362 m) kaj sekve promenis al la monto *Łabski Szczyt* (1472 m), ĉe grandegaj postglaceraĵ rokformoj t.n *Śnieżne Kotły* (*Neĝaj Kaldronoj*) kaj al pinto *Wielki Szyszak* (1509 m) - la dua la plej alta pinto en la montaro. De ĝi jam videblis en la malproksima distanco la pinto *Śnieżka*. Neĝkovritaj pintoj aspektis bele, sed estis

malvarme kaj survoje mi renkontis multajn skiistojn kaj skikuristojn. Vizito de tiu montaro instigas sportumi!

Sciindas, ke en la montaro lernis skii la ĉefa sportistino *Ester Ledecká*, ĉi-jara gajnistino de du oraj medaloj en la alpa skiado kaj en la neĝtabulado, dum la Vintra Olimpiko okazinta en la sudkorea urbo Pjongĉango (2018).

La bela montara naturo vekigas kreativecon kaj allogas multajn artistojn. Inter tieaj montaranoj vivis ekzemple ĉefdevena, la pola artisto-pentristo *Wlastimil Hofman*, kaj la germana verkisto *Carl Hauptmann*, kiu verkis belajn legendojn pri montara spirito, havis bonajn rilatojn kun multaj poloj kaj antaŭ 100 jaroj apogis sendependiĝon de Pollando.



Montara spirito Karkonosz
(foto: sudety.blox.pl)

Por iom ornami mian rakonton, mi prezentas unu el al plej belaj montaraj legendoj, kies ĉefa heroo estas - *Karkonosz* aŭ alinome *Liczyrzepa* (*Karkonoŝ*, *Rapokalkulanto*). Ĝi aperas en ili kiel kaprica giganto, gnomo, aŭ montara spirito. La prezentita en legendoj reganto de la Karkonosze-montaro estas specifa estaĵo - impertinenta kaj malica kiel maljuna gorilo, alifoje sindonema kaj servema kiel delikata kaj zorgema patro, kiu alportas konsolon. Sed fakte, senbrida kiel la naturo mem. En la plej granda monto de Sudetoj - la Neĝulino - troviĝas la sidejo de Karkonosz - la montara spirito.

Iufoje ĝi ekvidis belan virgulinon, filinon de la princo de *Świdnica* kaj decidis preni ŝin al sia ŝtona fortikaĵo. Li iĝis la vento kaj kuris al la kastelo. Tie, dum la okazanta festeno, li forkaptis la principinon Dobrogniewa je la okuloj de gastoj kaj la amata princo Mieszko. Post iom da tempo, li metis la knabinon ĉe pordego de sia sidejo kaj diris al ŝi: "Jen via hejmo. Vi restos kun mi!" Sed la princino, sur la sojlo, komencis plendi: "Kiel mi povas resti ĉi-tie, ja via kortumo estas malplena kaj malhela. Neniun serviston vi havas. Kiu zorgos pri mia komforto?" Aŭdinte ĉi-tiujn vortojn Karkonosz forflugis al kampoj kaj kolektis rapojn. Post kelka tempo li revenis, sorĉe ŝanĝis la rapojn en servistojn, kaj al la montaj koboldoj li ordonis fari grandajn fenestrojn, por ke la fortikaĵo fariĝu pli agrabla. Tamen, la knabino ne perdis tempon dum la foresto de Karkonosz: ŝi trovis mesaĝistojn inter la sovaĝaj bestoj kaj sendis leterojn al Mieszko. Li baldaŭ alvenis al la

monto kaj komencis batalon. Ambaŭ, Karkonosz kaj Mieszko estis spertaj en luktado, do ili ne povis solvi la duelon. Dobrogniewa decidis: "Venku tiu, kiu estas pli saĝa. Jen viaj taskoj. Vi, Mieszko kalkulos ĉiujn trezorojn en la ĉambro, Karkonosz kalkulos la rapojn, kiujn li alportis el la kampoj. Mi restos kun tiu, kiu plenumos sian taskon pli rapide. Sed, se iu faros eraron en kalkulado, tiu malvenkos". Tuj kiam la Montara Spirito ekokupiĝis pri la tasko, la gejunuloj eskapis de la fortikaĵo kaj ekkuris al la preĝejo por kunligi sin al la geedza paro. Kiam Karkonosz rimarkis, ke li estis sagace trompita, estis jam tro malfrue. Li nenion povis fari kontraŭ la ĵuro de amo. Li kaŝiĝis honte ene de Neĝulino en sia malhela, ŝtona fortikaĵo. Ekde ĉi-tiu evento li estas ŝerce nomata *la Rapokalkulanto*.

Tamen, se vi renkontos Karkonosz vagante tra la montaro, mi ne konsilas al vi voki lin tiel - ĉar en batalarto vi eble ne estas tiel sperta kiel montara spirito. Venu al la montaro Krakonosze, por ĝui ĝian belecon kaj sperti la ĉeeston de montara spirito!

Homoj

D-ro Aneta Stawiszyńska, „Ziemia Łódzka” 10/2018

Heinrich Zimmermann-strato

La fino de somero kaj komenco de aŭtuno 1918 alportis sekvajn mortojn dum la militaj operacioj de la Granda Milito. La 19-an - 21-an de septembro 1918, britaj trupoj venkis batalon ĉe la Megido, kontraŭ la armeo de Otomana Imperio, akcelante la malvenkon de ĉi tiu lando, kaj fine de la monato kapitulacis Bulgario, starante sur la flanko de la centraj ŝtatoj.

Dume, pli vaste nekonata itala kapuceno Francesco Forgione, pli konata kiel Padre Pio el Pietrelcina, aŭ Padre Pio, ricevis, la 20-an de septembro, stigmatojn, kaj 5 videblajn vundojn – respondaj al la vundoj de Kristo – kiuj restis sur lia korpo ĝis lia morto, la 23-an de septembro 1968.

En tiu tempo, loĝantoj de Łódź vivis siajn vivojn, observante de malproksime rulantajn ŝanĝojn en Eŭropo.

Heinrich Zimmermann estis granda lodza felietonisto. Oni ne multe scias pri lia vivo. La tekstoj, kiujn li lasis, montras, kiom multe Zimmermann sciis pri Łódź kaj ĝiaj loĝantoj. Li mem, kiel judo, enskribiĝis en multkulturismon de la urbo. Li skribis ĉefe en la germana, kvankam li

ankaŭ parolis flue la polan. Malgraŭ lia riĉa literatura heredaĵo de la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento, li restas ĝis hodiaŭ preskaŭ forgesita persono.

Siajn tekstojn li subskribis kutime per "HZ" aŭ "H Z-man." En redakcio de la germanlingva ĵurnalo la "Neue Lodzer Zeitung" Zimmermann pritraktis ĉefe temojn pri kulturo. Li estis konsiderata kiel influa recenzisto de teatro-arto. La plej gravaj estis tamen liaj felietonoj, en kiuj li ironie komentis la vivon de la urbo kaj ĝiaj loĝantoj. En la periodo de la unua mondmilito, por siaj propraj bezonoj li kreis la fikcian heroon Jakob Ewigkeit, ruzulon, kiu estis la enkorpigo de tipa loĝanto de Lodzo, kiu, ne estis edukita, sed profunde fidis je siaj kapabloj kaj kompetentecoj. Ekde tiam, per la buŝo de Jakob, al kiu nenio kio rilatis la urbon Łódź estis fremda, la ĵurnalisto komentis ĉirkaŭan realon. Jakob en siaj tekstoj estis la proparolanto de la urba strato kaj ĝia karakteriza maniero kompreni la mondon. Li esprimis ekzemple diferencon inter ambiciaj artaj intencoj kaj malbonaj perceptkapabloj de la urba spektantaro. Li ankaŭ faris "vojaĝojn", dum kiuj li komparis vizititajn lokojn kun Łódź.

Neue Lodzer Zeitung.

Verlagshaus
Gemeinsch. Verlag des Osts. 1901, 1902, 1903, 1904, 1905, 1906, 1907, 1908, 1909, 1910, 1911, 1912, 1913, 1914, 1915, 1916, 1917, 1918, 1919, 1920, 1921, 1922, 1923, 1924, 1925, 1926, 1927, 1928, 1929, 1930, 1931, 1932, 1933, 1934, 1935, 1936, 1937, 1938, 1939, 1940, 1941, 1942, 1943, 1944, 1945, 1946, 1947, 1948, 1949, 1950, 1951, 1952, 1953, 1954, 1955, 1956, 1957, 1958, 1959, 1960, 1961, 1962, 1963, 1964, 1965, 1966, 1967, 1968, 1969, 1970, 1971, 1972, 1973, 1974, 1975, 1976, 1977, 1978, 1979, 1980, 1981, 1982, 1983, 1984, 1985, 1986, 1987, 1988, 1989, 1990, 1991, 1992, 1993, 1994, 1995, 1996, 1997, 1998, 1999, 2000, 2001, 2002, 2003, 2004, 2005, 2006, 2007, 2008, 2009, 2010, 2011, 2012, 2013, 2014, 2015, 2016, 2017, 2018, 2019, 2020, 2021, 2022, 2023, 2024, 2025, 2026, 2027, 2028, 2029, 2030, 2031, 2032, 2033, 2034, 2035, 2036, 2037, 2038, 2039, 2040, 2041, 2042, 2043, 2044, 2045, 2046, 2047, 2048, 2049, 2050, 2051, 2052, 2053, 2054, 2055, 2056, 2057, 2058, 2059, 2060, 2061, 2062, 2063, 2064, 2065, 2066, 2067, 2068, 2069, 2070, 2071, 2072, 2073, 2074, 2075, 2076, 2077, 2078, 2079, 2080, 2081, 2082, 2083, 2084, 2085, 2086, 2087, 2088, 2089, 2090, 2091, 2092, 2093, 2094, 2095, 2096, 2097, 2098, 2099, 2100, 2101, 2102, 2103, 2104, 2105, 2106, 2107, 2108, 2109, 2110, 2111, 2112, 2113, 2114, 2115, 2116, 2117, 2118, 2119, 2120, 2121, 2122, 2123, 2124, 2125, 2126, 2127, 2128, 2129, 2130, 2131, 2132, 2133, 2134, 2135, 2136, 2137, 2138, 2139, 2140, 2141, 2142, 2143, 2144, 2145, 2146, 2147, 2148, 2149, 2150, 2151, 2152, 2153, 2154, 2155, 2156, 2157, 2158, 2159, 2160, 2161, 2162, 2163, 2164, 2165, 2166, 2167, 2168, 2169, 2170, 2171, 2172, 2173, 2174, 2175, 2176, 2177, 2178, 2179, 2180, 2181, 2182, 2183, 2184, 2185, 2186, 2187, 2188, 2189, 2190, 2191, 2192, 2193, 2194, 2195, 2196, 2197, 2198, 2199, 2200, 2201, 2202, 2203, 2204, 2205, 2206, 2207, 2208, 2209, 2210, 2211, 2212, 2213, 2214, 2215, 2216, 2217, 2218, 2219, 2220, 2221, 2222, 2223, 2224, 2225, 2226, 2227, 2228, 2229, 2230, 2231, 2232, 2233, 2234, 2235, 2236, 2237, 2238, 2239, 2240, 2241, 2242, 2243, 2244, 2245, 2246, 2247, 2248, 2249, 2250, 2251, 2252, 2253, 2254, 2255, 2256, 2257, 2258, 2259, 2260, 2261, 2262, 2263, 2264, 2265, 2266, 2267, 2268, 2269, 2270, 2271, 2272, 2273, 2274, 2275, 2276, 2277, 2278, 2279, 2280, 2281, 2282, 2283, 2284, 2285, 2286, 2287, 2288, 2289, 2290, 2291, 2292, 2293, 2294, 2295, 2296, 2297, 2298, 2299, 2300, 2301, 2302, 2303, 2304, 2305, 2306, 2307, 2308, 2309, 2310, 2311, 2312, 2313, 2314, 2315, 2316, 2317, 2318, 2319, 2320, 2321, 2322, 2323, 2324, 2325, 2326, 2327, 2328, 2329, 2330, 2331, 2332, 2333, 2334, 2335, 2336, 2337, 2338, 2339, 2340, 2341, 2342, 2343, 2344, 2345, 2346, 2347, 2348, 2349, 2350, 2351, 2352, 2353, 2354, 2355, 2356, 2357, 2358, 2359, 2360, 2361, 2362, 2363, 2364, 2365, 2366, 2367, 2368, 2369, 2370, 2371, 2372, 2373, 2374, 2375, 2376, 2377, 2378, 2379, 2380, 2381, 2382, 2383, 2384, 2385, 2386, 2387, 2388, 2389, 2390, 2391, 2392, 2393, 2394, 2395, 2396, 2397, 2398, 2399, 2400, 2401, 2402, 2403, 2404, 2405, 2406, 2407, 2408, 2409, 2410, 2411, 2412, 2413, 2414, 2415, 2416, 2417, 2418, 2419, 2420, 2421, 2422, 2423, 2424, 2425, 2426, 2427, 2428, 2429, 2430, 2431, 2432, 2433, 2434, 2435, 2436, 2437, 2438, 2439, 2440, 2441, 2442, 2443, 2444, 2445, 2446, 2447, 2448, 2449, 2450, 2451, 2452, 2453, 2454, 2455, 2456, 2457, 2458, 2459, 2460, 2461, 2462, 2463, 2464, 2465, 2466, 2467, 2468, 2469, 2470, 2471, 2472, 2473, 2474, 2475, 2476, 2477, 2478, 2479, 2480, 2481, 2482, 2483, 2484, 2485, 2486, 2487, 2488, 2489, 2490, 2491, 2492, 2493, 2494, 2495, 2496, 2497, 2498, 2499, 2500, 2501, 2502, 2503, 2504, 2505, 2506, 2507, 2508, 2509, 2510, 2511, 2512, 2513, 2514, 2515, 2516, 2517, 2518, 2519, 2520, 2521, 2522, 2523, 2524, 2525, 2526, 2527, 2528, 2529, 2530, 2531, 2532, 2533, 2534, 2535, 2536, 2537, 2538, 2539, 2540, 2541, 2542, 2543, 2544, 2545, 2546, 2547, 2548, 2549, 2550, 2551, 2552, 2553, 2554, 2555, 2556, 2557, 2558, 2559, 2560, 2561, 2562, 2563, 2564, 2565, 2566, 2567, 2568, 2569, 2570, 2571, 2572, 2573, 2574, 2575, 2576, 2577, 2578, 2579, 2580, 2581, 2582, 2583, 2584, 2585, 2586, 2587, 2588, 2589, 2590, 2591, 2592, 2593, 2594, 2595, 2596, 2597, 2598, 2599, 2600, 2601, 2602, 2603, 2604, 2605, 2606, 2607, 2608, 2609, 2610, 2611, 2612, 2613, 2614, 2615, 2616, 2617, 2618, 2619, 2620, 2621, 2622, 2623, 2624, 2625, 2626, 2627, 2628, 2629, 2630, 2631, 2632, 2633, 2634, 2635, 2636, 2637, 2638, 2639, 2640, 2641, 2642, 2643, 2644, 2645, 2646, 2647, 2648, 2649, 2650, 2651, 2652, 2653, 2654, 2655, 2656, 2657, 2658, 2659, 2660, 2661, 2662, 2663, 2664, 2665, 2666, 2667, 2668, 2669, 2670, 2671, 2672, 2673, 2674, 2675, 2676, 2677, 2678, 2679, 2680, 2681, 2682, 2683, 2684, 2685, 2686, 2687, 2688, 2689, 2690, 2691, 2692, 2693, 2694, 2695, 2696, 2697, 2698, 2699, 2700, 2701, 2702, 2703, 2704, 2705, 2706, 2707, 2708, 2709, 2710, 2711, 2712, 2713, 2714, 2715, 2716, 2717, 2718, 2719, 2720, 2721, 2722, 2723, 2724, 2725, 2726, 2727, 2728, 2729, 2730, 2731, 2732, 2733, 2734, 2735, 2736, 2737, 2738, 2739, 2740, 2741, 2742, 2743, 2744, 2745, 2746, 2747, 2748, 2749, 2750, 2751, 2752, 2753, 2754, 2755, 2756, 2757, 2758, 2759, 2760, 2761, 2762, 2763, 2764, 2765, 2766, 2767, 2768, 2769, 2770, 2771, 2772, 2773, 2774, 2775, 2776, 2777, 2778, 2779, 2780, 2781, 2782, 2783, 2784, 2785, 2786, 2787, 2788, 2789, 2790, 2791, 2792, 2793, 2794, 2795, 2796, 2797, 2798, 2799, 2800, 2801, 2802, 2803, 2804, 2805, 2806, 2807, 2808, 2809, 2810, 2811, 2812, 2813, 2814, 2815, 2816, 2817, 2818, 2819, 2820, 2821, 2822, 2823, 2824, 2825, 2826, 2827, 2828, 2829, 2830, 2831, 2832, 2833, 2834, 2835, 2836, 2837, 2838, 2839, 2840, 2841, 2842, 2843, 2844, 2845, 2846, 2847, 2848, 2849, 2850, 2851, 2852, 2853, 2854, 2855, 2856, 2857, 2858, 2859, 2860, 2861, 2862, 2863, 2864, 2865, 2866, 2867, 2868, 2869, 2870, 2871, 2872, 2873, 2874, 2875, 2876, 2877, 2878, 2879, 2880, 2881, 2882, 2883, 2884, 2885, 2886, 2887, 2888, 2889, 2890, 2891, 2892, 2893, 2894, 2895, 2896, 2897, 2898, 2899, 2900, 2901, 2902, 2903, 2904, 2905, 2906, 2907, 2908, 2909, 2910, 2911, 2912, 2913, 2914, 2915, 2916, 2917, 2918, 2919, 2920, 2921, 2922, 2923, 2924, 2925, 2926, 2927, 2928, 2929, 2930, 2931, 2932, 2933, 2934, 2935, 2936, 2937, 2938, 2939, 2940, 2941, 2942, 2943, 2944, 2945, 2946, 2947, 2948, 2949, 2950, 2951, 2952, 2953, 2954, 2955, 2956, 2957, 2958, 2959, 2960, 2961, 2962, 2963, 2964, 2965, 2966, 2967, 2968, 2969, 2970, 2971, 2972, 2973, 2974, 2975, 2976, 2977, 2978, 2979, 2980, 2981, 2982, 2983, 2984, 2985, 2986, 2987, 2988, 2989, 2990, 2991, 2992, 2993, 2994, 2995, 2996, 2997, 2998, 2999, 3000, 3001, 3002, 3003, 3004, 3005, 3006, 3007, 3008, 3009, 3010, 3011, 3012, 3013, 3014, 3015, 3016, 3017, 3018, 3019, 3020, 3021, 3022, 3023, 3024, 3025, 3026, 3027, 3028, 3029, 3030, 3031, 3032, 3033, 3034, 3035, 3036, 3037, 3038, 3039, 3040, 3041, 3042, 3043, 3044, 3045, 3046, 3047, 3048, 3049, 3050, 3051, 3052, 3053, 3054, 3055, 3056, 3057, 3058, 3059, 3060, 3061, 3062, 3063, 3064, 3065, 3066, 3067, 3068, 3069, 3070, 3071, 3072, 3073, 3074, 3075, 3076, 3077, 3078, 3079, 3080, 3081, 3082, 3083, 3084, 3085, 3086, 3087, 3088, 3089, 3090, 3091, 3092, 3093, 3094, 3095, 3096, 3097, 3098, 3099, 3100, 3101, 3102, 3103, 3104, 3105, 3106, 3107, 3108, 3109, 3110, 3111, 3112, 3113, 3114, 3115, 3116, 3117, 3118, 3119, 3120, 3121, 3122, 3123, 3124, 3125, 3126, 3127, 3128, 3129, 3130, 3131, 3132, 3133, 3134, 3135, 3136, 3137, 3138, 3139, 3140, 3141, 3142, 3143, 3144, 3145, 3146, 3147, 3148, 3149, 3150, 3151, 3152, 3153, 3154, 3155, 3156, 3157, 3158, 3159, 3160, 3161, 3162, 3163, 3164, 3165, 3166, 3167, 3168, 3169, 3170, 3171, 3172, 3173, 3174, 3175, 3176, 3177, 3178, 3179, 3180, 3181, 3182, 3183, 3184, 3185, 3186, 3187, 3188, 3189, 3190, 3191, 3192, 3193, 3194, 3195, 3196, 3197, 3198, 3199, 3200, 3201, 3202, 3203, 3204, 3205, 3206, 3207, 3208, 3209, 3210, 3211, 3212, 3213, 3214, 3215, 3216, 3217, 3218, 3219, 3220, 3221, 3222, 3223, 3224, 3225, 3226, 3227, 3228, 3229, 3230, 3231, 3232, 3233, 3234, 3235, 3236, 3237, 3238, 3239, 3240, 3241, 3242, 3243, 3244, 3245, 3246, 3247, 3248, 3249, 3250, 3251, 3252, 3253, 3254, 3255, 3256, 3257, 3258, 3259, 3260, 3261, 3262, 3263, 3264, 3265, 3266, 3267, 3268, 3269, 3270, 3271, 3272, 3273, 3274, 3275, 3276, 3277, 3278, 3279, 3280, 3281, 3282, 3283, 3284, 3285, 3286, 3287, 3288, 3289, 3290, 3291, 3292, 3293, 3294, 3295, 3296, 3297, 3298, 3299, 3300, 3301, 3302, 3303, 3304, 3305, 3306, 3307, 3308, 3309, 3310, 3311, 3312, 3313, 3314, 3315, 3316, 3317, 3318, 3319, 3320, 3321, 3322, 3323, 3324, 3325, 3326, 3327, 3328, 3329, 3330, 3331, 3332, 3333, 3334, 3335, 3336, 3337, 3338, 3339, 3340, 3341, 3342, 3343, 3344, 3345, 3346, 3347, 3348, 3349, 3350, 3351, 3352, 3353, 3354, 3355, 3356, 3357, 3358, 3359, 3360, 3361, 3362, 3363, 3364, 3365, 3366, 3367, 3368, 3369, 3370, 3371, 3372, 3373, 3374, 3375, 3376, 3377, 3378, 3379, 3380, 3381, 3382, 3383, 3384, 3385, 3386, 3387, 3388, 3389, 3390, 3391, 3392, 3393, 3394, 3395, 3396, 3397, 3398, 3399, 3400, 3401, 3402, 3403, 3404, 3405, 3406, 3407, 3408, 3409, 3410, 3411, 3412, 3413, 3414, 3415, 3416, 3417, 3418, 3419, 3420, 3421, 3422, 3423, 3424, 3425, 3426, 3427, 3428, 3429, 3430, 3431, 3432, 3433, 3434, 3435, 3436, 3437, 3438, 3439, 3440, 3441, 3442, 3443, 3444, 3445, 3446, 3447, 3448, 3449, 3450, 3451, 3452, 3453, 3454, 3455, 3456, 3457, 3458, 3459, 3460, 3461, 3462, 3463, 3464, 3465, 3466, 3467, 3468, 3469, 3470, 3471, 3472, 3473, 3474, 3475, 3476, 3477, 3478, 3479, 3480, 3481, 3482, 3483, 3484, 3485, 3486, 3487, 3488, 3489, 3490, 3491, 3492, 3493, 3494, 3495, 3496, 3497, 3498, 3499, 3500, 3501, 3502, 3503, 3504, 3505, 3506, 3507, 3508, 3509, 3510, 3511, 3512, 3513, 3514, 3515, 3516, 3517, 3518, 3519, 3520, 3521, 3522, 3523, 3524, 3525, 3526, 3527, 3528, 3529, 3530, 3531, 3532, 3533, 3534, 3535, 3536, 3537, 3538, 3539, 3540, 3541, 3542, 3543, 3544, 3545, 3546, 3547, 3548, 3549, 3550, 3551, 3552, 3553, 3554, 3555, 3556, 3557, 3558, 3559, 3560, 3561, 3562, 3563, 3564, 3565, 3566, 3567, 3568, 3569, 3570, 3571, 3572, 3573, 3574, 3575, 3576, 3577, 3578, 3579, 3580, 3581, 3582, 3583, 3584, 3585, 3586, 3587, 3588, 3589, 3590, 3591, 3592, 3593, 3594, 3595, 3596, 3597, 3598, 3599, 3600, 3601, 3602, 3603, 3604, 3605, 3606, 3607, 3608, 3609, 3610, 3611, 3612, 3613, 3614, 3615, 3616, 3617, 3618, 3619, 3620, 3621, 3622, 3623, 3624, 3625, 3626, 3627, 3628, 3629, 3630, 3631, 3632, 3633, 3634, 3635, 3636, 3637, 3638, 3639, 3640, 3641, 3642, 3643, 3644, 3645, 3646, 3647, 3648, 3649, 3650, 3651, 3652, 3653, 3654, 3655, 3656, 3657, 3658, 3659, 3660, 3661, 3662, 3663, 3664, 3665, 3666, 3667, 3668, 3669, 3670, 3671, 3672, 3673, 3674, 3675, 3676, 3677, 3678, 3679, 3680, 3681, 3682, 3683, 3684, 3685, 3686, 3687, 3688, 3689, 3690, 3691, 3692, 3693, 3694, 3695, 3696, 3697, 3698, 3699, 3700, 3701, 3702, 3703, 3704, 3705, 3706, 3707, 3708, 3709, 3710, 3711, 3712, 3713, 3714, 3715, 3716, 3717, 3718, 3719, 3720, 3721, 3722, 3723, 3724, 3725, 3726, 3727, 3728, 3729, 3730, 3731, 3732, 3733, 3734, 3735, 3736, 3737, 3738, 3739, 3740, 3741, 3742, 3743, 3744, 3745, 3746, 3747, 3748, 3749, 3750, 3751, 3752, 3753, 3754, 3755, 3756, 3757, 3758, 3759, 3760, 3761, 3762, 3763, 3764, 3765, 3766, 3767, 3768, 3769, 3770, 3771, 3772, 3773, 3774, 3775, 3776, 3777, 3778, 3779, 3780, 3781, 3782, 3783, 3784, 3785, 3786, 3787, 3788, 3789, 3790, 3791, 3792, 3793, 3794, 3795, 3796, 3797, 3798, 3799, 3800, 3801, 3802, 3803, 3804, 3805, 3806, 3807, 3808, 3809, 3810, 3811, 3812, 3813, 3814, 3815, 3816, 3817, 3818, 3819, 3820, 3821, 3822, 3823, 3824, 3825, 3826, 3827, 3828, 3829, 3830, 3831, 3832, 3833, 3834, 3835, 3836, 3837, 3838, 3839, 3840, 3841, 3842, 3843, 3844, 3845, 3846, 3847, 3848, 3849, 3850, 3851, 3852, 3853, 3854, 3855, 3856, 3857, 3858, 3859, 3860, 3861, 3862, 3863, 3864, 3865, 3866, 3867, 3868, 3869, 3870,

organizaĵoj, por konvinki ilin pri la utileco de la lingvo, kreita de L. Zamenhof. Li ankaŭ organizis la tn. *Vesperojn de Esperanto-propagando*. Samtempe li bedaŭris, ke la aŭtoritatoj de Łódź ne memorfestis personon de la kreinto de Esperanto. En 1918 li publikigis alvokon al la urba komisiono, kiu ŝanĝis stratnomojn ... *"Sinjoroj, vi ŝerĉas novajn meritajn homojn. Ne forgesu pri d-ro Zamenhof, kreinto de Esperanto. Ja li naskiĝis en Pollando kaj laboris en Pollando / ... / La mondaj kongresoj akceptis Zamenhof kun reĝa agnosko, en Pollando, oni ne volis scii pri li. La profeto ne trovis aprobon en sia lando /.../. Sinjoroj, havu kuraĝon eternigi la nomon de Zamenhof. Nomu unu el la stratoj de Łódź per nomo de Zamenhof. Havu la deziron esti la unuaj, vi devas esti la unuaj. Montru, ke vi estas grandanimaj en viaj pensoj kaj juĝoj"*.

Bonajn ideojn valoras imiti. Ĉi-tie ankaŭ mi permesas al mi proponi al la nunaj aŭtoritatojn de Łódź, kiuj serĉas novajn patronojn de novaj stratoj, ke ili konsideru H. Zimmerman, certigante, ke pli karakterizan personon por Łódź oni ne trovos.

Paweł Fischer-Kotowski

Hori Jasuo: La Esperantisto de la Jaro 2018

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark



Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016) kaj Trezoro Huang Yinbao (2017).

En 2018 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis por la 21-a fojo. Ĉi-jare 18 kandidatigantoj proponis 22 kandidatojn, al kiuj 17 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Hori Jasuo — 11 voĉoj

Halina Gorecka — 5 voĉoj

Carlo Minnaja — 4 voĉoj

Peter Baláž — 3 voĉoj

Kvar kandidatoj ricevis po du voĉojn, tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Hori Jasuo, 77-jara universitata instruisto el Japanio, eksa estrarano de Japania Esperanto-Instituto (1993–2014) kaj UEA (2007–2010), redaktoro de *La Revuo Orienta* kaj poste de *Esperanto en Azio*, prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) en la jaroj 2001–2006. Li estas elektita pro la lanĉo kaj daŭra funkciigo de la populara legoprojekto “Esperanto-Sumoo”, kiu en novembro 2018 atingis la 55-an sesion kun pli ol 300 legemuloj el 33 landoj, kaj pro la regula verkado kaj eldonado de la eseero *Raportoj el Japanio*, kies 21-a volumo aperis ĉi-jare ĉe lia eldonejo *Horizonto*.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2018, Hori Jasuo!

Lingvosciencia angulo

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

La – specialaj uzoj – 1-a parto

Kelkfoje *plej* ne montras ion unikan, sed plej altan gradon de eco aŭ maniero. Tiam oni ne uzu *la*:

- *Eĉ **vulpo plej ruza** fine estas kaptata.* Ne temas pri certa konata vulpo, sed pri iu ajn vulpo maksimume ruza.

- *Li ekaŭdis bruon tonon, kiu povis ektimigi la koron eĉ de **plej kuraĝa viro**.* Temas ne pri certa difinita kuraĝa viro, sed pri la kategorio de plej kuraĝaj viroj.

• *Ĉiuj floroj brilis en **plej belegaj koloroj***. Temas pri speco de koloroj. Se oni aldonus *la*, temus pri ĝuste tiuj koloroj, kiuj estas plej belaj, kaj la parolanto supozus, ke la aŭskultanto scias precize, kiuj estas tiuj koloroj.

• *Li estas **plej laca** en la mateno*. Ne temas pri komparo inter diversaj personoj, sed pri komparo inter diversaj lacecoj de unu sama persono en diversaj tempoj.

• *Kiu venas **plej frue**, sidas **plej ĝue***. Plej ne staras antaŭ O-vorta frazparto, sed antaŭ E-vorta frazparto.

• *Ŝi hontis siajn larmojn kaj deziris kaŝi ilin kiel eble **plej rapide***.

La eĉ estas tiel ofta antaŭ plej, ke oni ofte uzas ĝin pro nura kutimo, eĉ kiam ne temas vere pri io konata aŭ unika:

• *Por vi mi en **la plej malluma nokto** irus al la fino de la mondo*. Ne temas pri difinita unika nokto, sed pri iu ajn nokto maksimume malluma. Pli bone estus sen *la*.

Zamenhof eĉ uzis *la plej* ĉe E-vortaj frazpartoj:

• *Malsupre en la domo estas **la plej bele** kaj tie oni sin sentas **la plej oportune***. Zamenhof uzis *plej*, ĉar temas pri komparo inter pluraj belecoj kaj oportunecoj. En la domo troviĝas do la plej bela el ĉiuj belecoj, kaj la plej oportuna el ĉiuj oportunecoj. Nuntempe oni tamen preferas ne uzi *la* ĉe E-vortaj frazpartoj. Zamenhof en la komenca tempo uzis *la* tiamaniere eĉ ene de O-vorta frazparto, kiu jam havis *la*: **la sonojn **la plej multe** komunajn al ĉiuj plej gravaj lingvoj**. Tia uzo estas evitinda.

Imagata difiniteco

Kiam oni parolas pri imagata okazo, oni ofte uzas *la*, kiam temas pri certa individua afero, kiu apartenas nur al tiu imagata okazo, kaj kiu estas kvazaŭ konata ene de tiu imagata situacio:

• *Propran nomon oni povas nun skribi tiel, kiel ĝi estas skribata en **la gepatra lingvo** de ĝia posedanto*. En ĉiu unuopa okazo estas nur unu certa lingvo. En ĉiu aparta okazo, la lingvo estas do konata. Se oni ne uzus *la*, oni komprenus, ke iuj posedantoj havas plurajn gepatrajn lingvojn.

• *Ĉiun fojon, kiam mortas bona infano, anĝelo de Dio malleviĝas sur la teron, prenas **la mortintan infanon** sur siajn brakojn [...]*Oni parolas pri ĝenerala principo, sed oni devas uzi *la* por montri, ke la anĝelo ĉiufoje prenas ĝuste tiun bonan infanon, kiu estas mortinta tiufoje. Se oni ne uzus *la*, oni supozus, ke la anĝelo ĉiufoje prenas iun ajn mortintan infanon.

La komence de rakonto

En literaturo oni ofte uzas *la* tuj en la komenco de rakonto, kvankam la leganto tute ne scias pri la aferoj:

- **La matena simfonio de la kazernoj vekadis la svene dormantan urbon.** Komenco de *Sur Sanga Tero* de Julio Baghy. La leganto ne povas scii, pri kiu urbo temas, kaj ne scias ion pri la matena simfonio, kaj tute ne pri la kazerno, ĉar la rakonto apenaŭ komenciĝis.

- **La urbestro staris ĉe la malfermita fenestro.** Komenco de fabelo. Tia ĉi nenormala uzo de *la* donas al la leganto la impreson, kvazaŭ li mem ĉeestas, kaj povas vidi la okazaĵojn per propraj okuloj.

Oni ofte uzas ankaŭ personajn pronomojn ĉi tiel komence de rakonto: *Post jarmiloj ili alflugos sur la flugiloj de la vaporo tra la aero trans la monda oceano! La junaj loĝantoj de Ameriko vizitos la maljunan Eŭropon.* Komenco de fabelo. Nur en la dua frazo oni ekscias, kiuj “ili” estas.

Konciza lingvaĵo

En poezio kaj proverboj, kie oni deziras tre mallongajn frazojn, oni iafoje forlasas *la*: *Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras. Buŝon = la buŝon, ĝian buŝon.*

Citaĵoj

Iafoje oni uzas *la* antaŭ vortetoj, kiuj ne havas sian normalan frazrolon, sed estas iel cititaj. *La* tiam vere rilatas al subkomprenata O-vorto antaŭ la citaĵo. **La “tuj” de sinjoroj estas multe da horoj. = La vorto “tuj” signifas por sinjoroj “multe da horoj”.**

Literaturaĵoj

Teresa Nemere

Polaj kristnaskaj kantoj

Larĝe en Pollando estis kaj estas kantataj kristnaskaj kantoj. Kortuŝaj tekstoj, tre variaj melodioj kaj la kutimo kanti ilin ne nur en preĝejoj, sed ankaŭ ofte hejme, mirigas multajn eksterlandanojn. La kantoj devenas de la malnova, praslava kutimo kantante bondeziri komence de la nova jaro prosperon hejme, en bovinejoj kaj sur kampoj. Poste, la kutimo transiris ankaŭ al la kristana festo de Kristnasko, celebrata fine de decembro. Al la bondeziraj kantoj aldoniĝis religiaj motivoj de la evangeliaj rakontoj pri la naskiĝo de Kristo. Ĝis hodiaŭ en kelkaj regionoj, precipe en vilaĝoj, migras speciale vestitaj grupoj, kiuj en teatra formo rememorigas okazintaĵojn rilatantaj naskiĝon de Kristo kaj bondeziras al dommastroj, kolektante ĉeokaze diversajn donacojn. Ekde fino de la 15-a jarcento, danke al streboj

de la franciskanaj kaj bernardinaj monakoj, oni aranĝadis tiutemajn teatraĵetojn en preĝejoj, dum kiuj estis kantataj multaj kristnaskaj kantoj. Dum sekvaj jarcentoj, en Pollando oni verkis multajn tiutipajn kantojn. Pluraj el ili apartenas al juvelaĵoj de la pola popola kaj religia poezio.



En la kutime religiaj tekstoj ofte ekaperas gajaj, humoraj, kaj satiraj akcentoj. En la tekstoj, kreitaj dum la tempo de la landa dispartigo kaj dum militoj, oni povas trovi ankaŭ patriotismajn elementojn. Specialan karakteron havas polaj

pastoraloj – paŝtistaj gajaj kantoj, rakontantaj pri paŝtistaj travivaĵoj, malriĉeco, donacoj kaj ĝojo pro naskiĝo de Kristo. Tre variaj kaj interesaj estas ankaŭ melodioj de la kantoj. Ofte ili estis verkitaj en ritmo de mazurko, oberko, krakovjako aŭ polonezo, sed aŭdeblas ankaŭ marŝo kaj lulkanto. Inter multaj nekonataj aŭtoroj de la kanttekstoj estas ankaŭ famaj poetoj, kiel ekz. Franciszek Karpiński kaj nuntempe - Ernest Brill, Katarzyna Gertner kaj aliaj. Por multaj poloj, vivantaj malproksime de la patrujo, la kristnaskaj kantoj estis kaj plu estas simbolo de poleco, memoraĵo de la forlasita patrujlando. Tio respeguliĝas i.a. en la konata verko de Frederiko Chopin - *Scherzo h-moll*, en kies tragikaj akcentoj la komponisto enplektis dolĉan, lulkantan melodion de la populara pola kristnaska kanto *Lulajze, Jezuniu...*

Multaj kristnaskaj kantoj estas tradukitaj al Esperanto. Estus interese esplori, kiu la unua esperantigis tiuspecan kanton kaj kiam ekaperis la unua tradukaĵo. Nuntempe troveblas diversaj esperantlingvaj kantaretoj, en kiuj ni trovas ankaŭ kristnaskaj kantoj. Ni trovas ilin ankaŭ en la konata preĝlibro *Ni kunvenu*, prilaborita de la pastro J. Zielonka, iama animzorganto de polaj esperantistoj. Okaze de la proksimiĝanta ĉijara Kristnasko, ni rememorigas kristnaskan kanton,



tradukitan de la pastro Tadeo Nowakowski, entuziasma esperantisto, dum jaroj laboranta kiel paroĥestro en la vilaĝo Ostrowite, kie li tre gastame akceptadis esperantistojn kaj kie lia paroĥeja ĥoro kantis en la preĝejo ankaŭ esperantlingve.

Triumfoj el ĉiela sfero
Eksonis nokte sur la tero
Vekis tie paŝtistojn,
De ŝafaro gardistojn
Per la kant', per la kant', per la kant'

Al Dio, en ĉielo gloro,
Por homoj, paco en Sinjoro,
Ĉar naskiĝis Savonto,
Dia Elaĉetonto
Sur la ter, sur la ter' sur la ter'

Jen virga ino patriniĝis
Kaj Dio mem el ŝi naskiĝis,
Por nin elinferigi
Kaj post morto loĝigi
En ĉiel, en ĉiel' en ĉiel'!


Saĝulaj pensoj

Andreo Bach

Blanka panpeco

La aspekton de oblato, precipe ĝian delikatan guston, mi ekkonis jam en mia infanaĝo. Oblato estas tre maldika, plata, blanka, senacida bakaĵo, bakita el blanka faruno kun akvo, sen fermentilo. En mia familio estis la kristnaska kutimo, ke dum la festa vespermanĝo, la 24-an de decembro, ni dividis inter ni la oblaton kaj transdonis reciproke bondezirojn. Ĉe la tablo kolektiĝis tiam miaj geavoj (la gepatroj de mia panjo), miaj gepatroj kune kun miaj tri fratoj kaj mi, miaj geonkloj kaj miaj gekuzoj. Ĉio okazis teretaĝe en la domo, kie ni loĝis kune kun la geavoj. Ni vespermanĝis en du apudaj ĉambroj, ĉe apartaj tabloj: unu por la plenkreskuloj kaj la alia por ni –

diversaĝaj infanoj. Estis vintro, sed estis lume kaj estis varme, ne nur pro du kahelaj fornoj tie.



Tre grava estis kristnaska abio, freŝe detranĉita en arbaro, sur kies branĉetoj pendis brilantaj, koloraj globetoj, paperaj ĉenoj faritaj de infanoj, ofte eĉ kuketoj kaj fruktoj. Prilumis ĝin koloraj, elektraj ampoletoj, tiutempe jam uzataj en multaj domoj. Por ĉiu infano la plej grava momento de la vespero estis la disdonado de donacoj, fonditaj de la gepatroj, eĉ de parencoj. Kelkfoje okazis, ke la donacojn disdonadis surpriza gasto kun barbo, kiun la mondo konas kiel Sankta Nikolao – ofte tio estis speciale alivestita parenco aŭ najbaro, por ke infanoj ne rekonu lin. Ni verdire nomis lin iom alie - mi povus diri, ke en Esperanto eblas nomi lin „stelulo” aŭ “stelhomo”. Indas klarigi, ke en mia regiono la antaŭkristnaska vespero nomiĝis „steleto”. Oni nomis ĉi vesperon tiel, ĉar estis la kutimo komenci la festadon, kiam sur la ĉielo ekbrilas la unua stelo. Komence de la festa vespero, ni kutimis malŝalti la lumon en la ĉambro, brilis nur lampetoj sur la verda abio, ni kantis kristnaskajn kantojn, dum unu el miaj onkloj ludis akompane akordionon. Poste oni rompis la blankan panon, disdonis ĝiajn pecojn kaj bondeziris reciproke. Por ni, infanoj, ne estis problemo manpremi kaj kisi ĉeokaze niajn proksimulojn: ni volonte manĝis la

restintajn panpecetojn. Poste estis dolĉaĵoj kun kafo kaj senvianda vespermanĝo.

Tamen post jaroj, por kelkaj plenkreskuloj, kiuj dum sia vivo travivis ne unu sperton, la kutimo, dividi la oblaton kun manpremo kaj bona vorto, fariĝis iom pli malfacila. Oni ja devas rigardi en la okulojn de alia persono kaj pripensi, kion deziri, kion diri. Estas la tempo forgesi malbonon de la pasinteco kaj esprimi tion, kion ni dezirus en la estonteco. Sed plej gravas, ke la esenco de la kutimo estas krei pli da paco, pli da bono, pli da feliĉo por la aliaj kaj rezulte de tio - por la tuta mondo. Nuntempe oni aranĝas oblatajn renkontiĝojn ankaŭ en laborejoj kaj aliaj publikaj lokoj. La blanka panpeco restu simbolo de pardono kaj paciĝo, la signo de amikeco kaj amo - ni esprimu nian volon esti kune, en ĉiam pli bona mondo.

Poŝtkesto



La teamo de IIK 2019

Infana kongreseto dum UK

La Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK) okazas dum UK rande de Lahti.

IIK atendas infanojn kaj junulojn de ĉiu aĝo. Vidu retejon: bertosch.free.fr/iik2019. Vidu fotojn de la IIK-ejo: <http://bertosch.free.fr/iik2019/fotoj.htm>.

Ni serĉas pli da IIK-kungvidantoj, ekzemple junan skolton, sport-intstruiston, savnaĝiston, iun kiu konas multajn grup-ludojn aranĝeblaj interne kaj ekstere.

Tro junan infanon akompanas gepatroj. Gepatroj povas dormi en la IIKejo kaj tage partopreni UK-on. Se vi (gepatroj) ne iros al UK, sed viaj gefiloj volus veni al IIK, tiam ni provos organizi, ke alia e-isto el via lando akompanu viajn gefilojn al Lahti

Se la dato en julio ne taŭgas, venu aŭguste al infana-familia renkonto en Francio gresillon.org/s4.

Bv. respondu al:

infana.kongreseto@gmail.com. Bv. plusendi al interesantoj.





Vytenis Anriukaitis subtenas la 55-an BET

La 29-an de oktobro 2018 altranga politikisto, membro de Eŭropa Komisiono (Eŭrokomisaro) Vytenis Andriukaitis en la reprezentejo de Eŭropa komisiono en Vilno akceptis la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas. Krom kelkaj aliaj aferoj de la Esperanto-movado estis priparolitaj la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55), okazontaj la 6-14-an de julio 2019 en Panevėžys. Andriukaitis konsentis subteni ĉi tiun gravan esperantistan aranĝon. Se la cirkonstancoj permesos, li persone partoprenos la solenan inaŭguron de BET-55 kaj faros paroladon en Esperanto.



Anna Löwenstein

Nova retejo por novaj esperantistoj

Bonvenon al *uea.facila*, la nova retejo de UEA.

En ĉi tiu retejo vi trovos informojn kaj novaĵojn pri la Esperanto-movado. La artikoloj estas mallongaj kaj facile legeblaj por helpi homojn, kiuj nun lernas la lingvon. Sed espereble ankaŭ pli spertaj esperantistoj trovos ilin interesaj!

Ni deziras, ke la informoj en ĉi tiu retejo vojaĝu ne nur en unu direkton. Tial ni invitas niajn legantojn mem kontribui. Vi povos aldoni viajn komentojn sub artikoloj, kaj esprimi vian opinion pri la filmetoj prezentataj en la rubriko "Filmetoj".

Kiuj estas niaj legantoj? Prezentu vin mem en la rubriko *Niaj legantoj*. Vi trovos pli da informoj pri tiu rubriko ĉi tie.

Ĉu vi kaj aliaj esperantistoj el via urbo aŭ regiono organizis renkontiĝon aŭ kunvenon? Ĉu formiĝis nova grupo? Sendu mallongan informon kaj foton de la okazaĵo al la rubriko *Loke*.

Nun vi komprenas, kiaj informoj kaj artikoloj aperos en ĉi tiu retejo. Ni invitas vin legi, mem kontribui, kaj ĝui.



Kalendaro

Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando kaj najbaraj landoj en 2019

29-31. 03.2019	PEJ -semajnfino en Lodzo	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
26-28. 04.2019	Esperanta Printempo en Szczecin	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Szczecin. lobacz.k@onet.eu
11.05. 2019	Esperanto-stando dum 23-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alvamo@wp.pl
23-30. 05.2019	4-a Internacia Majrendevuo Wroclaw - Zlotoryja	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
23.05. 2019	5-a Internacia Simpozio, Wroclaw Temo: Esperanto - disvolvado de homaj personecoj en la etapo de la junaĝo kaj la tria aĝo	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
31.05- 02.06. 2019	38-a Pola Esperanto-Kongreso en Łochów	Estraro de Pola Esperanto-Asocio estraro@esperanto.pl
25-26. 05.2019	7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, Wroclaw en prestiĝa loko: Filharmonia str. Piłsudskiego 19	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
07-18. 06.2019	41-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com
15.06. 2019	Vizito en Sztolnia Dziedziczna - karbogalerio en muzea karbominejo „Królwa Luiza” en Zabrze	PEA-filio en Gliwice, Aleksander Zdechlik, aleksander.zdechlik@gmail.com
16.06. 2019	Montara Renkonto Czantoria Wielka en Beskidy-Montaro	suchanekj@seznam.cz

27.07.- 05.08. 2019	Internacia Junulara kultura Interŝanĝo Pollando – Litovio. 15-a datreveno de membriĝo de ambaŭ landoj en EU.	Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz halinakomar@gmail.com
26.07.- 04.08. 2019	Esperanta stando dum PolAndRock Festival - en Kostrzyn ĉe la rivero Odra. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo	Andi Münchow, andim@gmx.li
04-09. 09.2019	Internacia Esperantista Feriado Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
13-15. 09.2019	Esperanto Sur la Strando - 2019 Gdynia – Sopot, temo: "Najbaroj"	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl FB – Esperanto Sopot.pl
20-22. 09. 2019	35-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2019” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/
11-13. 10.2019	43-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
09-11. 11.2019	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 23 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
06-07. 12.2019	4-a Esperanta konkurso “Vortbeleco en Esperanto” Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
13-15.12. 2019	20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo pwierzbowski@gmail.pl
27.12-3.01 2020	11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Głuchołazy.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl

Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

27.12-3.01.2019	17-a Novjara Renkontiĝo (NR) - en Wiesbaden, Germanio	EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 10551 Berlin. - retadreso: lu.esperanto@gmx.de
27.12-03.01.2019	Luminesk' - en Königswinter apud Bonn, Germanio	Andreas Diemel, Andreas Diemel, Bismarckstr. 168, 47057 Duisburg, Germanio. - retadreso: andreas.diemel@web.de
03-07.01.2019	Poludnica 2019, 37-a Internacia renkontiĝo de vojaĝantoj-esperantistoj en vilaĝo Liptovský Ján (Malaltaj Tatroj, Liptov-regiono), Slovakio	Liptova Esperanto-klubo, Školská ul. 4, 031 01 Liptovský Mikuláš, poludnica83@gmail.com www.poludnica.esperanto.sk
01-09.05.2019	Esperanto-renkontiĝo Mirinda Lviv - en Lvov, Ukrainio	Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. -: tel. +38 (097) 4403172, retadreso volodomir@ukr.net. http://aromajalto.ukrainio.org.ua/
09 – 12.05.2019	TEK - Tutslovakia Esperanto-Kongreso - en Liptovský Hrádok, Slovakio	Esperantská Federácia, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio. - skef@esperanto.sk
10-16.05.2019	Esperanto-Tendaro en Kievo, ETK - Somera tendumado apud ĉefa ukraina rivero - Dnipro	Ihor Glagolevsjkij, str. Velika Aranautska 24/6, Odessa, Ukrainio. - tourmaestro79@gmail.com
7-10.06.2019	96-a Germana Esperanto-Kongreso - en Neumünster, Germanio	Deutscher Esperanto-Bund e.V., s-ino Siblle Bauer, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. - retadreso: siblle.bauer@esperanto.de
06-14.07.2019	55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Panevežys, Litovio	Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. - retadreso: litova.ea@mail.lt
28.07-04.08.2019	75-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Liptovský Hrádok, Slovakio.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. - Retadreso: ijk2019@tejo.org
17-20.10.2019	Kongreso de Ĉeĥa Esperanto -Asocio en Brno, Ĉeĥio.	Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. - retadreso: cea@esperanto.cz

17-a Novjara Renkontiĝo (NR) - en Wiesbaden. Kutime ĉ. 150-200 gastoj, inter ili sesdeko da infanoj kaj junuloj. Apartaj programeroj por junuloj sub la nomo "Novjara Internacia Semajno" (NIS). Konversacia rondo kaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la kvaran fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj. Ĉi-foje ĝi okazos en Königswinter apud la konata rivero Rejno.

Poludnica 2019. Tradicia vintra renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj, organizata ekde la jaro 1983. La kuranta, kvara jardeko de la renkontiĝoj jam havas internacian karakteron kun riĉa kelktaga programo, kie, krom turismaj programeroj estas pluraj sportaj aktivecoj, prelegoj pri vojaĝoj el la tuta mondo kaj informoj pri praktikaj scioj de vojaĝantoj.

Mirinda Lviv - en Lvov. Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio.

55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estas tradicia esperantista aranĝo, organizata ekde 1959, laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio kun riĉa kaj serioza movada, eduka, instrua, kultura kaj ekskursiva programo.

Oni eldonis

**Pola ZEO - informilo
nr-o 37 - 2019
Zamenhof/Esperanto-Objektoj
en Pollando
Zamenhof/Esperanto-Objekty
w Polsce**

Broŝuro A5, 24 paĝoj
Eldonis: Robert Kamiński - UEA-
delegito por ZEO-j
Łódź 2019, prezo 5 zlotoj plus
sendkosto




Feliks Hiller
„Ho tiuj fremduloj”
 Opereto en unu akto
 Redaktis: Tomasz Chmielik
 La kovrilpaĝon projektis:
 Przemysław Wierzbowski
 Eldonis: Dokumenta Esperanto-
 Centro, Bjalistoka Esperanto-Societo,
 Libro-Mondo, Ars Libri. Bjalistoko,
 Lublin, Świdnik, Durdevac 2018.
 Serio Esperanta Biblioteko



„Bjalistokaj kajero” nr-o 8
 22 verkoj de literatura konkurso
 Lingvo: pola kaj Esperanto
 Redaktis: Elżbieta Karczewska

Eldonis: Podlaha Libraro
 kaj Bjalistoka Esperanto-Societo
 Bialistoko 2018

Grandeco 15x21 cm
 ISBN 978-83-66137-02-8



**„Zbigniew Herbert - Poeto de
 konscienco”**

Broŝuro


Redaktis:

Romuald Skaliński

Grandeco 15x21 cm

Eldonisto: Esperanto-Societo FLAMO
 Toruń 2018

ISBN 978-83-63333-41-6



Robert Kamiński

Konata vortaro ankoraŭ aĉetebla

Estimataj amikoj, denove eblas aĉeti flavan vortaron "Obszerny słownik Polsko-Esperancki", kiun skribis Kazimierz Strzelecki kaj Maria Bonczol. La vortaro estas aĉetebla en Lodza Filio de Pola Esperanto-Asocio. La vortaro kostas 35 zlotojn (kun sendokosto). Bonvolu turni vin al Robert Kamiński, telefone 601 17 49 17, aŭ per interreto: rk-lodzo@wp.pl.



Forpasis

La 12-an de junio 2018, en Niedzwica Duża apud Lublin forpasis multjara esperantisto **Zbigniew Czupkałło**. Li estis entombigita en tombejo en Niedzwica Duża kun bedaŭro, informas, Robert Kamiński

El fotogalerio de Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki

Kvinaj Esperantaj Tagoj de Kraków - 1985


5-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo okazis 12-14 de aprilo 1985 j. en Krakova Ĉefkulturdomo troviĝanta en "Palaco sub virŝafoj" (Pałac pod Baranami). Aranĝon organizis Pola Esperanto Asocio, filio en Krakovo. Organiza teamo: Stanisław Świstak, Janusz Błaszczyk, Stefania Michałek, Lidia Ligęza, Zamorska, Helena Bukowska, Marian Kostecki.



Ĉefkulturdomo en Kraków troviĝanta en Pałac pod Baranami ("Palaco sub ŝafoj").



Prelego de Stanisław Świstak, prezidanto de Krakova filio de PEA



Prelego de Antoni Golonka „Mallogikajoj en la esperanta leksiko”



Koncerto de Jerzy Handzlik



Koncerto de junulara ensemblo „Revulinjoj” el Etk



Ekspozicio de Janina Pawluk Nowakowa – pentroarto kaj grafiko



10-a Junulara Esperanto-Semajno



Floroj por Ludoviko Zamenhof
Łódź 15.12.2018

NIA FOTOGALERIO 19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj

